# La Krimoj de Dio

(kontraŭkristanaj prelegoj)

Sébastien FAURE:

## La religia evolucio

## Pri la krima absurdeco de la religioj

****

Johann MOST:

## La dia pesto

**S.A.T.-Broŝurservo**
**1999**
**Laŭte! - FR-47470 Beauville**

# Enhavo


## Unua parto:

## Sébastien FAURE

* Portreto (Aline Aurouet)
* Enkonduko (Sébastien Faure)
  Noto de SAT-Broŝurservo
* **La religia evolucio**
* **La krima absurdeco de la religioj**

## Dua parto:

## Johano MOST

* Noto de SAT-Broŝurservo
* Antaŭvorto (D-ro Tobias Sigel)
* **La dia pesto**




Sébastien FAURE, 1858-1942. Franca verkisto kaj oratoro de anarkiismo kaj liberpenso. Aŭtoro de multaj libroj kaj broŝuroj. Iniciatinto de "Anarkiisma Enciklopedio".

Pro la peto de multaj personoj dezirantaj konservi memoraĵon pri la kontraŭreligiaj paroladoj, kiujn mi faras, mi decidis publikigi ĉi tiun broŝuron.

Oni legos ĉi-sube analizon, kiel eble plej fidelan, de tiuj paroladoj.

Estas vere, ke mi nur resumas. Tiu malgranda libreto ne sufiĉus, se mi volus doni al mia penso ĉiujn vastigojn fareblajn ĉe la tribuno.

Tio, kio sekvas, do estas kiel la skeleto, sur kiun ĉiu metos iom da karno; kiel la kanvaso, sur kiu ĉiu spirito brodos laŭ sia plaĉo; kiel la temo, sur kiu ĉiu menso faros la ŝanĝojn, kiujn ĝi kredos bonaj.

Feliĉa mi estos, se miaj gelegantoj trovos en tiu armilejo armilojn, kiuj al ili ebligos fortike ataki kaj venki la nepaceman malamikon de ĉiu progreso, de ĉiu liberigo: la religian spiriton.

**Sébastien FAURE**

## Noto de SAT-Broŝurservo

Tiu ĉi broŝuro origine aperis en Esperanto en la kolekto "**Paco-Libereco**", en 1911, eldonita de la "Esperantista Laborista Presejo" (Parizo). Unua reeldono: fare de "**La Juna Penso**", 1976.

Tradukis el la franca Luis CARLOS kaj F. BUOKIN.

La lingvon kelkloke korektis aŭ modernigis SAT-Broŝurservo. La konkludo, nun ne plu aktuala, ne aperas en la ĉi-reeldonita teksto.

# La Religia Evolucio

Novaj laboroj sciencaj mirinde klarigis la teorion pri transformismo, kies teorio igas konstatebla tiun fakton, ke en la naturo nenio estas senmova aŭ neŝanĝebla, ke ĉio evolucias, ŝanĝiĝas, transformiĝas.

Ŝajnis interese al laboremaj spirituloj serĉi, ĉu tiu leĝo pri evolucio trovas sian enkondukon en la ideara mondo, kaj de nun ŝajnas pruvite, ke la ideo - kiel la materio - travivas senĉesan sekvon da statoj, kaj eterne metamorfoziĝas.

Se oni akceptas, ke la Ideo mem estas nur rebrilo interna de l' ĉirkaŭaĵo, nur alfaro al la temperamento de ĉiu, el la sentaĵoj ricevitaj, el la impresoj sentitaj; se oni diras, ke, en la naturo ĉio transformiĝas, estas ankaŭ, kompreneble, direbla, ke la ideo - tiel bone kiel ĉiu afero kaj sammaniere - estas submetata al la leĝaro de la transformismo.

Sed, ĉar en multaj spiritoj, estas dubo pri la materiaj devenoj de l' Ideo, mi pensis, ke estus utile kontroli la ĝustecon de tiu tezo, kiu similigas la Ideon kun la organizita estaĵo, almetante al donita Ideo ĝustegan observon, kaj mi elektis la religian ideon, tiel pro la grandega rolo, kiun ĝi ludis en la estinteco, kiel pro ĝia loko ankoraŭ okupata en niaj priokupoj, kiel pro la klerika vekiĝo, kiun ni ĉeestas.

Ĉiu organizita estaĵo naskiĝas, kreskas kaj mortas. La demando estas scii, ĉu oni vidas en la religia ideo tiujn tri fazojn: la naskiĝon, kreskadon kaj morton.

Tiuj tri periodoj formos la dividon de mia temo; sekve mia parolado enhavos tri partojn: 1-e, naskiĝo; 2-e, kreskado; 3-e malapero de la religia ideo.

# 1. Naskiĝo de la religia ideo

Amaso da libroj estas verkitaj pri la deveno de la kultoj, kaj se oni kunigus ĉiujn tiujn, kies temo estas la serĉado pri la kondiĉoj kaj cirkonstancoj, kiuj ĵetis sur nian planedon la ideon pri la ekzistado de unu aŭ multaj diaĵoj, oni povus facile formi per ili unu el la plej grandegaj bibliotekoj konataj.

Pri la temo: "Kie, kiam, kiel la ideo pri Dio prezentiĝis al la homa spirito?" la opinioj estas multaj kaj kontraŭdiraj.

Ĉar precizaj dokumentoj ne ekzistas, estas nur, kaj povas esti nur hipotezoj.

Jen estas tiu, kiu ŝajnas al mi la plej verŝajna, kaj se mi rapidas anonci, ke estas temo nur pri hipotezo kaj pri aro da konjektoj, estos tamen al mi permesite aldoni, ke la kredebleco de tiuj konjektoj kaj de tiu hipotezo min impresegas, kaj, mi tion esperas, kaptos vian saĝon.

La bezonon scii, t.e. kompreni, klarigi la fenomenojn, en kiuj la individuoj sin movas, la bezonon scii, ne por la sola scienca plezuro, sed en la celo utiligi la fortojn, kiuj ĝin ĉirkaŭas kaj neniigi tiujn, kiuj minacas ĝian vivon, tiun bezonon scii oni trovas en vi, en mi, en ni ĉiuj. Ĝi ekzistas laŭ diversaj gradoj, sed ĉu multe, ĉu malmulte, oni ĝin sentas ĉe ĉiuj.

La senĉesa plimultiĝo de la homaj konoj estas sufiĉa pruvo, ke tiu bezono ne estas propra al niaj nuntempaj civilizacioj. La postsignoj jam tre antikvaj pri la unuaj penadoj efektivigitaj de niaj prapatroj celantaj **konadon**, pruvas, ke tiu bezono jam ekzistis en la plej malnovaj tempoj. Estas do permesite konkludi pri tiuj konstatoj, ke la bezono scii ne estas malkunigebla de la individuo alveninta ĝis iu grado de inteligenteco.

Ĉar tiu bezono naskas la ideon pri Dio, jen estas la hipotezo. Jen nun la konjektoj klarigantaj, tre kredeble, la naskiĝon de tiu ideo.

Je la origino, la malgrandaj aŭ grandaj fenomenoj konser-

vis antaŭ la praavoj misterajn iradojn. La neklarigita naturo ankoraŭ liveris neniun el siaj sekretoj, tial la homo estis dum kelkaj jarcentoj kiel boateto skuata de la ventego, kaj senpova por sin gvidi. Tamen epoko venis, kiam la neceso ekscii fariĝis necesega. Ĉu la homa estaĵo povis resti eterne sendefenda kontraŭ la naturaj fortoj, la elementoj, la malfeliĉegoj ligitaj kontraŭ ĝi, la malamikoj de ĉiu kategorio kunigitaj kontraŭ ĝia ekzistado?

Ĝi sagace penadis por eltrovi necesajn klarigojn. Ĝia plena nescio ne ebligis al ĝi aljuĝi al la fenomenoj observitaj pozitivan kaj kontroleblan klarigon, tial ĝi estis fatale kondukita intermeti aron da agantoj superhomaj al kiuj ĉiujn povojn ĝi malŝpareme atribuis.

Plenigita je bruoj, koloroj, formoj, bildoj kaj impresoj ŝanĝeblaj senlime, ĝia imago iĝis la gradeca akceptejo de mil kaj mil ideoj ĥaosaj, renversegitaj, kontraŭdiraj, kies ĝia tuta estaĵo estis la kaptaĵo perforte obeema; en la vento, kiu muĝis, en la ventego, kiu bruegis, en la fulmofajro, kiu brilis, en la suno, kiu lumigis ĝian iradon, en la nokto, kiu ĝin envolvis per mallumoj, en la pluvo, kiu falis, nia praavo vidis ĉu amikajn aŭ malamikajn estaĵojn loĝantajn en samaj regionoj, aŭ la elmontron de malbonvolo aŭ de boneco ĉe aliaj estaĵoj loĝantaj en superaj regionoj.

Dio estis do, unue, la personiĝo de la elementoj kaj de la fenomenoj naturaj, aŭ ankaŭ la materiiĝo de la kaŭzoj entenantaj tiujn fenomenojn aŭ elkatenantaj tiujn elementojn.

La taga kaj nokta sinsekvado, la daŭro de la sezonoj, inspiris al la homoj ideon pri la tempo. Hodiaŭo, hieraŭo, morgaŭo, ŝajnis al ili kvazaŭ la tri terminoj de la tempo: estinteco, estanteco, estonteco. Kaj, ĉar dum fatale kaj rapide mortis la individuoj, dum rapidege sinsekvis la generacioj, la vento plu muĝis, la ventego plu bruegis, la fulmofajro plu brilis, la suno plu lumis, la pluvo plu falis, ili elpensis estaĵojn vivantajn longan tempon, eble vivantajn ĉiam, sekve nemortemajn.

En siaj vagabondaj kuradoj tra la nemezureblaj stepoj, ili formis al si ideon pri spaco senfina, kaj ili estis tre impresitaj de la senlimeco tiel pri la spaco, kiel pri la tempo.

La ideo pri Dio, laŭ tiu duobla rilato, fariĝis la daŭrigo ĝis absoluto pri la observitaj okazoj de la konitaj rilatiĝoj.

En la suno, kiu maturigis la fruktojn, akcelis la vegetadon kaj heligis ĝian groton aŭ ĝian kajuton, nia praavo vidis tutkompreneble amikon, bonfaranton: la Bonon. La malvarmo, kiu haltigis la kreskon de la kreskaĵoj kaj rigidigis ĝiajn membrojn; la nokto, kiu loĝigis ĝian kavernon per fantomoj kaj karnomanĝantoj avidaj je ĝia karno; mallonge, en ĉio, kio minacis aŭ forigis ĝian ekziston, ĝi tute nature korpigis la malamikon: la Malbonon.

Kaj tiel ĝi elpensis la Spiriton de la Bono kaj de la Malbono, la Diaĵojn amikajn kaj malamikajn, la Diojn de Lumo aŭ Mallumo.

Ankoraŭ unu fojon, nenio pruvas, nerefuteble, ke la aferoj tiel okazis; sed estas permesite tion akcepti, ĉar, se nenia dokumento decidiga pravigas tiun serion da hipotezoj, nenio ankaŭ alportas la pruvon pri la malĝusteco aŭ certigas alian serion da supozoj.

Se estus necese, mi povus favore utiligi la du jenajn konsiderojn pri mia hipotezo:

Vi scias, ke ekzistas sur iaj teritorioj de nia planedo estaĵoj, kiuj per sia tipo, sia konformiĝo, siaj kutimoj, la geografia situacio de la regionoj de ili loĝataj, la lingvo parolata, tendencoj, revivigas antaŭ niaj okuloj la epokojn jam de longe formalaperintajn. Nu, la rakontoj de la vojaĝistoj, kiuj esploris tiujn regionojn rigardatajn kiel senhomajn, kaj kiuj vivadis pli-malpli longatempe meze de tiuj primitivaj civilizacioj, estas konforma laŭ ĉiuj punktoj al la opinio, kiun mi ĵus eldiris pri la apero de la Dia ideo, kaj pri la unuaj formoj, kiujn ĝi alprenis.

Dua konsidero: vi scias ankaŭ, ke la infano prezentas kun mirinda rapideco, efektive, sed precize, ĉiujn ringojn de la prapatra ĉeno. Nu! vidu infanon: ĝi estas senscia, kaj tamen

ĝi estas turmentata de la scivolemo; ĝi estas kredema, pasiema pri mirindo, kaj inklina ĉu krei tutpece tuj kiam bolas ĝia petolema iamgo superhomajn estaĵojn, ĉu vidi en la elementoj ĝin ĉirkaŭantaj tiujn lastajn estaĵojn.

Tiam, ĉu estas malsaĝe pensi, ke dum la sinsekvo de la unuaj jarcentoj, ĉe la epoko de sia infaneco, la homaro tiel procedis?

Eraras, aŭ plivole, vin erarigas senhonte la friponoj el ĉiuj religioj, kiuj certigas, ke Dio kreis la homon laŭ sia bildo. Ni klare vidas nun, ke tute male, estas nur la homa malklereco, kiu naskis Diojn kaj ilin kreis laŭ la bildo de la individuo mem.

Jes, Dion la homo kreis laŭ sia bildo, aljuĝante al la Dioj ĉiujn atributojn, kies ideo naskiĝis ĉe ĝi per la konstato de la propraj fortoj kaj malfortoj, de propraj ecoj aŭ mankoj, aljuĝante al iuj la bonecon kaj al aliaj la malbonecon, glorante unujn per hela lumo kaj kondamnante la ceterajn sin movadi en mallumo, lokante ilin ĉiujn laŭ donitaj kondiĉoj pri tempo kaj loko, sed konsiderante ĉiujn siajn Diaĵojn kvazaŭ tra pligrandiga vitro de sia nescia imago, kaj sekve, pliigante trans la observitaĵo, la vivantaĵo, ĉiuspecajn atributojn aljuĝitajn al tiuj senkontrolaj kreoj de ĝia cerbo.

## 2. Kreskado de la religia ideo

Oni senpene perceptas, ke la ideo pri Dio - unue, pure spekulativa - devis rapide ligiĝi kun la socia mondo.

Akcepti la estadon pri Diaĵo estas akcepti la neceson de la ligiloj, kiuj kunligas la kreiton al la kreinto, kaj la religio (**religare**, religi), ne estas alia afero ol aro da kredoj kaj kutimoj ligantaj la homon kun Dio, kondiĉantaj la rajtojn de la unua kaj la devojn de la dua.

De sia naskiĝo la religia ideo renkontis la ideon de supereco korpiĝantan en la muskoloj de la plej fortikaj.

La gentoj primitivaj estis en senĉesa milita stato. Sed la militistoj komprenis, ke iliaj muskolaj fortoj daŭros nur dum mallonga tempo, ke ili ne ĉiam estos dudekkvin- aŭ tri-

dekjaraj, ke junuloj venos kaj ilin anstataŭos. Por konservi sian superregecon la aŭtoritato de la pugnobato diligente akceptis la helpon de la morala aŭtoritato: tiu nova forto.

La unuiĝo estis fatala. Ĝi okazis. Sub la formo de Dio de la militistaroj ĝi sin montris. Oni vidis aretojn da batalantoj subtenataj de la fanatiko neniigi tutan armeon frenezigitan de teruro, ĉar la orakoloj estis parolintaj kontraŭ ĝi.

La piloto, siavice, alvokis la "Dion de la Ventegoj", la plugisto, la "Dion de la Rikoltoj"; kaj baldaŭ estis multegaj dioj kaj duondioj, batalantaj unuj la aliajn en siaj elmontriĝoj.

Sed la **bezono scii** turmentis la homan spiriton. Pensuloj naskiĝis, kiuj saĝe kredis, ke la Tutpotenco ne povas dividiĝi, ke ne povas esti konflikto, konkurso inter la ĉiopovantoj. Tiam la monoteismo (unudiismo) eliris el la instigoj de tiuj observoj.

La Kristanismo aperis. Je sia komenco, ĝi estis populara fluo, batalo de la malfortuloj kontraŭ la fortuloj, kaj se ni volus starigi paralelon inter la epoko, kiam Jesuo-Kristo, naskiĝinta en stalo, de malriĉaj gepatroj, li mem malriĉa, elektante dek du apostolojn inter la plej malriĉaj, predikadis kun ili por la senigitoj, kaj la epoko, kiun ni hodiaŭ travivas, dum kiuj viroj kun fervora parolo postulas pli da bonstato, pli da justeco, pli da egaleco, estus al ni facilege montri la frapantan analogion.

Dum pli ol du jarcentoj la Kristanismo daŭrigis sian popularan celon, instigante la subpremegatojn al ribelo, ĉiam militante kontraŭ la riĉuloj. Oni ankaŭ vidis la Romian nobelaron ĵetantan al la sovaĝaj bestoj milojn kaj milojn da kristanoj kiel paŝtaĵon.

Sed homoj sin enmiksis en tiun movadon, kiuj al ĝi donis novan direkton. Profitante de la mistikismo de la epoko, opiniante, ke la tempoj por la efektivigo ne estis ankoraŭ venintaj, ili nesenteble senigis Jesuo-Kriston je lia humaneco, lin diigis, lin aliigis en kreinton de nova religio, kaj kredemaj, nesciantaj, fanatikaj, la aliĝantoj al la viro de Betlemo eksiĝis iom post iom de la tujaj senperaj postulaĵoj

kaj de la teraj priokupoj; ili anstataŭigis, per la rezignacio kaj la amo al la kruco, la ribelan spiriton, kiu ĝis tiam ilin vivigis; ili jam deziregis nur mondon kun feliĉego eterna, praktikigante tiun parolon de la Skribaĵo* atribuitan al Jesuo-Kristo: "Mia reĝlando ne estas en tiu ĉi mondo".

Kaj kiam Konstanteno** ekvidis, ke la kristanismo, foriganta la kolerojn kaj fomentanta al la submetiĝoj, povis plifortigi lian povon, li alportis al ĝi sian helpon, kaj la paco estis farita.

De tiu momento la kristana ideo prenis eksterordinaran etendiĝon, kapturnigan kreskadon. Ĝi estis aŭdata de la altranguloj, ĝi donis konsilojn al la monarkoj. Antaŭ ĝi la plej fieraj fruntoj kliniĝis.

Ĉar la vivo estis nur mallonga trairo en tiu valo da larmoj, kio estis la tero? Unu sola afero estis grava: la savo de nia animo. La progreso estis malfruigita, la penso enkatenigita. Dubi estis krimo; neniu puno estis sufiĉe severa por tion kondamni.

Oni vidis la religian ideon partopreni en ĉiuj trouzoj, en ĉiuj ekspluatadoj. La papoj regas la reĝojn, la episkopoj ordonas la landsinjorojn. Ĉe la ekscitanta voĉo de Petro l' Ermito, de Sankta Bernardo kaj de la monaĥoj, kiuj parolas en la nomo de Jesuo-Kristo, milionoj da batalantoj ekmoviĝas, trairas Eŭropon, marŝas al Oriento, por konkeri la tombon de Jesuo kaj la terojn sur kiuj paŝis la Mesio.

Generacioj da fideluloj kovris la Okcidenton per belegaj katedraloj, per gigantaj bazilikoj. La muziko, la poezio, la skulptarto, la teatro, la pentrarto, la elokventeco, la literaturo, ĉiuj artaj manifestacioj, enpenetritaj de la katolikismo montras la ĉefajn faktojn de la biblia legendo. La spiritoj estas ĉarmitaj, la voloj submetitaj. La homaro tremas; ĝi adoras... Dio triumfas! Tio estas la apogeo de sukceso.

-------------

* Skribaĵo: nomo de la Evangelio (4 libroj skribitaj de 4 apostoloj, kaj kiuj enhavas la vivon kaj dogmaron de Jesuo-Kristo).

** Konstanteno-Granda (306-337), kristaniĝis kaj permesis la kulton de kristanismo en sia reĝolando en la jaro 313-a.

## 3. Malapero de la religia ideo

Sed la **bezono scii** daŭrigas sian laboron.

Tra la jarcentoj, la sciencoj progresadis. Elirinte el la longa kaj doloriga periodo de ekprovoj, la homa spirito ekdirektiĝas decide al la lumo. Maltimegaj karakteruloj fiere levas la lumingon de la Racio. La vanaj klarigoj iamaj jam ne sufiĉas por la fervora scivolemo de tiuj serĉantoj, kiuj malpacience skuas la ŝarĝon de la superstiĉoj.

La fiziko, la ĥemio, la naturscienco, la astronomio, klarigas parte tiujn fenomenojn, kiuj plenigis niajn prapatrojn je timo kaj admiro. La malnovaj tradicioj estas ekmovitaj. La batalo grandiĝas inter tiuj, kiuj volas ekscii, kaj tiuj, kiuj kvazaŭ kristaliĝas en la kredo. La Dogmo kaj la Racio interbataligas Dion sen filozofio kaj Filozofion sen Dio.

La antikvaj elpensaĵoj pri universo estas tute renversegitaj. La esploradoj de la scienculoj, helpataj de multepovaj aparatoj promenigitaj tra la spaco interrilatigas la teran mondon kun la leĝoj de la ĉiela meĥaniko.

La materialismaj tendencoj elmontriĝas, certiĝas, vastiĝas, kontraŭstarante la infanan kaj maldelikatan spiritualismon de la antaŭaj epokoj.

La hipotezo Dio pli kaj pli foriĝas. Dio, kiu malantaŭeniras, ĉesas esti Dio.

Nekontraŭbatalebla fluo fortiras al la ateismo (sendiismo) niajn generaciojn elerarigitajn.

Ju pli homo scias, des malpli ĝi estas preta kredi, kaj oni sin demandas, kial niaj generacioj ankoraŭ hezitas por sin liberigi el kredo, kiu malaperas.

La religia ideo eĉ jam konserviĝas nur dank'al forto de akirita rapideco. Ekzistas ankaŭ infanecaj impresoj, el kiuj oni ne povas tuj liberiĝi. Fine, la ideoj kaj la kredoj estas kiel maljunaj amikoj kun kiuj oni vivis dum tridek, kvardek jaroj, al kiuj mil memoraĵoj vin ligas, kaj kiujn oni ne povus subite forlasi.

Ne estas io tre eksterordinara, ke ni bezonas tiom da tempo por nin turni al la materialisma vivo.

Sed, tio ne estas neigebla, la Dioj foriĝas, kaj ni trovas pri tio la konfeson, eĉ en la skribaĵoj de niaj kontraŭuloj.

Ili ĉagreniĝas - ni ĝoju - pri la religia indiferenteco, kiu eniĝas en la popolamasojn, pri la sanktejoj, kiuj estas malpli vizitataj, pri la homaro, kiu iras sur la vojo al malpieco.

Maljuniĝante, la organizita estaĵo suferas pro malsano: la kripliĝo. La maljuneco fortiras kun si sian kutiman sekvantaron da kadukeco kaj da flekseco.

La religia sento estas tie; ĝi montras senenergiecon, neneigeblajn signojn de la ekfiniĝo, kiu antaŭeniras, kaj kondukas al la necesa malapero.

Ĉu oni deziras la pruvon, pruvon elmontran, nedisputeblan, videblan?

La katolika Eklezio - la religia potenco plej forte organizita en niaj regionoj - al ni ĝin liveras.

La katolika Eklezio sin proklamas, arogante, neŝanĝebla. Ĝi diras sin volonte indiferenta pri la ŝanĝoj, kiujn senĉese suferas la civilizacioj. Kaj tamen **politike** kaj **ekonomie**, ĝi transformiĝas aŭ prefere ŝajnas transformiĝi.

Ĝi sciigas, ke ĝi estas respublikana, eĉ socialista.

Tiu konvertiĝo ne povas esti sincera, ĉar la Eklezio akceptas Dion, antaŭ kies volo ĉio devas sin klini, kaj ke la Povo devas veni el supre, dum la Respubliko* postulas la volon esprimitan de ĉiuj kaj la Povon venantan el malsupre.

Ne kontenta respublikaniĝi, la Papo ekportas sur sia tiaro socialistan kokardon. Jen tio, kion ni ne povus akcepti.

Se al vi, pastroj, plaĉas eniri en Respublikon, kaj se la respublikanoj vin akceptas, des pli malbone por ili. Sed, se vi pretendas solvi la socian problemon, ni ne permesos tion al vi.

Kion do vi faris, dum la longaj jarcentoj de via ekskluziva potenco? Vi ligiĝis kun la mastroj, kun la nobeluloj, kun la reĝoj. Vi fariĝis la kunkulpuloj de ĉiuj maljustaĵoj, de ĉiuj ekspluatadoj. Kaj hodiaŭ, kiam vi nenio estas, kiam vi jam

---

* Nur la ideala Respubliko, sed neniu el la ekzistantaj respublikoj.

nenion povas fari, venas al vi tiu ideo: interesiĝi pri la venkitoj de la socia batalado?

Vi nenion faros, ĉar vi nenion povas.

Mi diros pli. Vi ne havas la rajton provi ion ajn laŭ tiu direkto.

Ĉio, kio ekzistas, estas la volo de Dio. Tio estas, ĉar Dio tion volis, ke estas malriĉuloj kaj riĉuloj, ekspluatatoj kaj ekspluatantoj, ke unuj mortas pro malsato kaj la ceteraj pro malbona digestado, kaj tio estus sakrilegia faro, se vi volus ion ŝanĝi, tio estus krimo transformi la ellaboraĵon de la kreinto, kies intencoj estas nepenetreblaj.

Ni havas la rajton plendi; vi, la devon submetiĝi, konfuzaj, ĉagrenaj, sed submetitaj!

## Interkonsento - Konkludo

Ekzistas tamen rimedo por interkonsenti. Vi mem diris: "La surteraj bienoj estas pereemaj kaj malŝatindaj, dum la ĉielaj bienoj estos ĝuado, feliĉo, kiuj ne havos finon." Nu, ni ne postulos de vi la duajn, sed lasu al ni la ceterajn. Ĉar estos al ni facile fari Paradizon sur la tero, la malamo lasos sian lokon al la boneco, kaj la valo da turmentoj fariĝos Edeno. Kaj jam sonis la horo por ĉion tion fari.

Mi diras al la respublikanoj, al la socialistoj: atentu! Tiuj homoj, kies kredon vi forĵetis, deziras havi rajtojn, kontentiĝon. Ili ne plu deziras malprecizajn promesojn. Ili volas tujajn solvojn. Ju pli vi atendos, des pli altrudeblaj fariĝos la perfortaj solvoj.

# Pri la krima absurdeco de la religioj

Kiaj personoj ni estas? De kie ni venas? Kien ni iras? Kaj la mondo, kiu nin ĉirkaŭas, el kie ĝi venas? Ĉu la severega sinsekvado de la faktoj, kies senĉesan kaj regulan spektaklon donas al ni la Naturo, estas la rezultato de la hazardo aŭ la belega plano elirinta el senlima inteligento helpata de tutpotenca volo?...

Jarcentoj forpasis de kiam la homaro sin demandis pri tiuj gravaj problemoj.

Laŭ la respondo ricevita, la vivo estas aŭ kvanto nezorginda aŭ treege grava.

Tiuj problemoj ne estas ankoraŭ solvitaj, kaj, eble, ia mallumo ĉiam ŝvebos super tiuj temoj.

Tamen, se la scienco ankoraŭ ne sukcesis forpeli ĉiujn hezitojn pri tiuj diversaj temoj, ĝi sukcesis elĵeti el la nombro da konjektoj, kiujn la racio ne povas allasi, la hipotezon "Dio", kiun naskis la antaŭsciencaj epokoj.

La nuna stato de la scienco jam ne ebligas al la malmulte inteligentaj spiritoj kaj kredemaj animoj rifuĝon en la antikvan kredon, por en ĝi trovi la informojn necesajn por la solvo de tiuj timindaj problemoj.

Ni supozu, ke dum unu el tiuj belegaj noktoj, kiam de la steloj la brileto niajn rigardojn ravas, du personoj estas promenantaj kaj interbabilantaj pri la impresoj, kiujn tiu grandioza spektaklo inspiras al ili.

Ni supozu, ke el ambaŭ personoj, unu estas infano, kaj la alia pastro.

La infano havas tian aĝon, kiam la spirito turmentata de scivolemo ne ĉesas elparoli mil kaj mil demandojn. Ĝi demandas la pastron pri la **kielo** kaj **kialo** de tiuj senfinaj

admirindaĵoj, kiuj naĝadas tra la spaco.

La pastro al ĝi respondas:

*"Mia infano, ĉiuj tiuj mondoj, kiuj ĝuste kaŭzas vian admiron, estas la faraĵo de la Superega Estaĵo. Estas ĝia senfina saĝeco, kiu reguligas ilian iradon, ĝia tutpotenca volo, kiu konservas la ordon kaj fortigas la harmonion en la Universo. Ankaŭ ni estas la ellaboraĵo de tiu Kreinto. Ĝi bonvolis konigi al ni per la helpo de siaj elektitoj la leĝojn, kiuj al ĝi plaĉas, ke ni obeu. Konformiĝi laŭ tiuj leĝoj estas: Bono, Virto. Foriĝi de ili estas: Malbono, Peko. La Virto al ni preparas eternan feliĉegon; la Peko, senfinan punon. Kreinto, Elpensinto kaj Providenco, jen kiu estas tiu Dio, al kiu ni ĉion ŝuldas."*

Sed tria promenanto alvenas. Tiu ĉi estas materialisto, ateisto, libera pensanto. Li sin enmiksas en la interparol--adon. Li respondas al la infano, ke la ordo, kiu regas en la Naturo, estas la rezultato de la fortoj, kiuj regas la kolektiĝon de la estaĵoj kaj objektoj. Li certigas, ke Dio estas nur elpensaĵo elirinta el la nescia imago de niaj prapatroj: ke ne estas Providenco ktp.

La diskutado, kiu tiam naskiĝas inter la kredemulo kaj ateisto estas nur resumo de la fervoraj disputadoj, kiujn naskis de multaj jarcentoj la religia problemo.

Ĝuste tiun diskutadon mia parolado intencas raporti, metante antaŭ la okulojn de mia aŭdantaro ĉiujn partojn de la malkonsento. Dum tiu diskutado mi penos elmontri:

1-e, ke la hipotezo "Dio" ne estas necesa;

2-e, ke ĝi estas neutila;

3-e, ke ĝi estas absurda;

4-e, ke ĝi estas krimema.

Ambaŭ unuaj partoj estas kunligeblaj pli speciale al Dio-Kreinto, la tria al Dio-Elpensinto, kaj la kvara al Dio-Providenco.

*

# La hipotezo "Dio" ne estas necesa

La pruvoj favoraj al la ekzisto de **leĝoj** regantaj la rilatojn de ĉiu objekto, kaj samtempe certigantaj la sendependecon de ĉiu estaĵo kaj la reciprokan dependecon aŭ solidarecon (harmonion) en la kolektiĝo, tiuj pruvoj estas en la nunaj tagoj tiel sufiĉegaj, ke la plej kredemaj el la plej kredemaj mem ĉesis ilin kontesti.

Sed kun tiu dialektika fleksebleco, kiu ĝin karakterizas, kaj kiu naskis kazuistikon* specialan, la religieco sin ŝirmas malantaŭ jena rezonado:

"Ekzistas leĝoj naturaj, kiujn obeas disaj mondoj tra la spaco. Nu: ni akceptu tion. Sed tio, kio signifas **Leĝon**, tio signifas ankaŭ **Leĝiston**. Plie, la leĝisto devas havi superan potencon kaj antaŭan al la fortoj submetotaj de lia leĝo. Ekzistas do superega Leĝisto."

Ni devas konfesi, ke multaj personoj kredis vidi en tiu argumentado decidigan konsideron por la hipotezo "Dio" tiel proklamita **necesa**.

La eraron de tiuj personoj oni povas facile klarigi. Ĝi venas de tiu analogio, kiun lertaj sofistoj provas krei inter la naturaj leĝoj, kiuj regas la materion, kaj la homaj leĝoj.

La rezonado de tiuj kazuistikistoj estas la sekvanta:

"La leĝoj, kiuj regas la homajn sociojn, bezonis la intermeton de la leĝisto. Tio ĉi kaj tio fatale estas implikeblaj. Sekve, la estado de leĝoj, kiuj la astrojn kaj planedojn regas, ĝustege ebligas la ekziston de Leĝisto supera kaj antaŭa al tiuj leĝoj, kaj ĝuste tiun Leĝiston ni nomas Dio."

Nu! tiu analogio estas tute erara.

---

* Parto de la Teologio, kiu traktas la konsciencajn okazintaĵojn.

Nenia simileco estas inter la naturaj leĝoj kaj la homaj leĝoj.

**Unua diferenciĝo.** - La naturaj leĝoj estas eksteraj (antaŭaj kaj postaj) al la homaro. Oni scias, kaj oni komprenas, ke longatempe antaŭ ol la apero de la unuaj homaj formoj sur nia terglobo, la leĝoj de la ĉiela meĥaniko regis nian planedon kaj ĉiujn korpojn, kiuj alteniĝe iradas tra la spaco. Oni scias, kaj ankaŭ komprenas, se ial okazus, ke la porekzistaj kondiĉoj necesaj al la homa specio malaperus el la tero, kiun ni piedpremas, la astroj kaj nia malgranda planedo mem daŭrigus sian jarcentan evolucion neniel bezonante ian ajn modifon.

Kontraŭe, la homaj leĝoj estas - la vorto tion montras - kunligataj kun la homaro. Ili formas leĝarojn, t.e. aron da ordonoj kaj malpermesoj formulitaj de homoj, kaj aplikeblaj por homoj.

**Dua diferenciĝo.** - La naturaj leĝoj havas karakteron de konstanteco, de neŝanĝebleco. Ili estas la karakterizaĵo de ĉiuj fizikaj, ĥemiaj, natursciencaj, matematikaj leĝoj.

Tute kontraŭe pri la antaŭaj, la homaj leĝoj - ĉar faritaj de homoj, kiuj mortas, kaj aplikeblaj por homoj ankaŭ mortemaj - ili estas esence transiraj, nedaŭraj, kaj eĉ kontraŭdiraj.

**Tria diferenciĝo.** - La naturaj leĝoj neniun malobeon toleras. La malobeo estus la **miraklo**, kaj estas pruvite, ke la **miraklo** ne ekzistas, ne povas ekzisti.

Kontraŭe, la homaj kodoj estas ĉiumomente malrespektataj. La sociaj fortoj: polico, ĝendarmaro, magistrataro k.c., atestas, ke multaj estas la malobeoj, kiujn suferas la homa leĝaro.

**Kvara diferenciĝo.** - La naturaj leĝoj registras la faktojn, ne determinante ilin. La piloto, ekzemple, informiĝas per la

markompaso, ne por obei ĝiajn montrojn, sed tial ke ĝi moviĝas laŭ sia propreco, ĉar la magnetigita pintileto, montrante senteble Nordon, ebligas al la marveturanto orientiĝi. Kontraŭe, la homaj leĝoj reguligas la faktojn, plej ofte ne registrante aŭ ne atentante ilin. Tiel, ne atentante pri la deziroj, kiuj nin movas, la impulsoj nin vivigantaj laŭ la nekontraŭstarebla leĝo, kiu altiras ambaŭ seksojn unu kontraŭ la alia, la homa leĝisto reguligas la seksajn rilatojn, ilin klasifikas laŭ permesotaj kaj malpermesotaj, ilin kategorie ordigas laŭ leĝaj kaj neleĝaj.

Oni povus ankoraŭ aldoni al tiu listo kontraŭdirojn aŭ diferencojn, kiuj ekzistas inter la leĝoj naturaj kaj la homaj leĝoj. La antaŭaj sufiĉas kaj ebligas konkludi, ke la analogio per kiu oni klopodas ĵeti konfuzon en la spiritojn, estas absolute neĝusta, kaj, ke la sekvoj, kiujn oni volas eltiri, estas laŭ ĉiuj vidpunktoj neakcepteblaj.

Do, konsiderata laŭ tiu vidpunkto, la hipotezo pri iu Dio, superega leĝisto, ne estas necesa.

"Sed nun, kontraŭparolas la diistoj, kiel klarigi la Universon? Unue, diru al ni, **kiu kreis la materion**, kaj poste, kie ĝi prenis la fortojn, kiuj ĝin movas kaj eltenas la korpojn ekvilibre en la tempo kaj en la spaco."

## Kiu kreis la materion?

Kaj unue, kiu kreis la materion? Jen mia respondo:

Image desegnu senfinan linion tra la spaco. Provu mezuri ĝian longecon. Eluzu ĉiujn matematikajn regulojn. Adiciu centojn da miliardoj kun miliardoj de miliardoj. Multipliku tiun treegan sumon per alia sumo miliardoble pli eksterordinara. Diru al mi, ĉu vi sukcesos koni la amplekson de tiu imaga linio tra la spaco? Ĉu vi povas aserti: "Jen estas la komenca punkto A, jen estas la fina punkto B" ? Ne, tion vi ne povas. La spaco estas senlima, kaj en ĉiuj anguloj kaj anguletoj de tiu nemezurebla spaco estas renkontebla la ma-

terio sub iu ajn formo: solida, fluida aŭ gasa.

Do la materio **ĉie** estas.

Tiu "senlimeco" tra la spaco implikas "senlimecon" en la tempo. Ĉiuj "senlimecoj" estas solidaraj. Ja, desegnu en la sinsekvo de la jarcentoj, kiuj formas la estintecon, imagan linion. Ĝin plilongigu laŭ la daŭro de la tempoj, kiuj formas la estontecon. Al ĝi ankoraŭ aldonu nombrojn pli fantaziajn. Ĉu vi povas, pensante pri la estintaj jarcentoj, trovi la komencan punkton, la **principium**, la originon? Ĉu vi povos, rememorante pri la jarcentoj, determini pri ilia definitiva finiĝo?

Ne.

Do, la materio estas ne nur **ĉiea** sed **ĉiama**.

Tiuj ecoj pri "**senfino**" ankoraŭ estas troveblaj en ĉiuj aliaj ecoj de la materio: ekzemple la volumeno.

Supozu grandegan, kolosan volumenon da materio. Ĉu estos al vi racie ebla certigi, ke vi povos ion aldoni? Nun, supozu la malon: dividu pocente, pomile, pomilione da partoj. Ĉu vi estos atinginta la lastan limon de tiu dividado? Ĉu vi ne jam povos apartigi?

Tiam nenia limigo en la dividebleco de la materio.

Sekve, laŭ tiu unua demando: **kiu kreis la materion?** mi respondas, ke tiu demando povus praviĝi, nur se eblus difini, ke tiu materio havis originon, komenciĝon, finiĝon. Nu, estas konstatite, ke tiu difino estas neebla. De nun neniel utilas sin turni al tiu konjekto, al kiu oni atribuus rolon, kiu ne estas necesa.

Ankaŭ laŭ tiu vidpunkto la hipotezo "Dio" ne estas necesa.

## La hipotezo "Dio" estas neutila

Tiuj konstatoj akiris ĝis hodiaŭ tian forton kaj tiel ĝeneraliĝis, ke la Diistoj jam ne kuraĝas ilin kontraŭdiri. Sed estus malbone koni tiujn ĉi lastajn, imagante, ke ili ne kontraŭstaros.

"Nu, ke tio estu, ili respondas. La spaco kaj la tempo estas senlimaj. Kun vi ni konsentas, ke la movado estas ĉie. Sed de

kie venas tiu movado mem? Kia estas la potenco, kiu ĝin enkorpigis en la materion? Tiu potenco, kiu ne nur movas la korpojn sed ankaŭ harmonie ordigas tiujn movojn, jen tio, kion ni nomas "Dio". La korpoj ne estas impulsitaj propramove. Estis necese, ke ili estu antaŭenpuŝitaj, forton ricevintaj. Tiu **komenca antaŭenpuŝo** ekmovas ĉiujn mondojn, tial ĉu ne estis necesege, ke la Estaĵo estu ĝin doninta?

Ĝi estas la ĉiama kaj jarcenta kverelo inter spiritualistoj kaj materialistoj, kiu sub formo iomete renovigita ree okazas tie ĉi.

## El kie venas la movado?

Kredante, ke laŭ sia naturo, la **malnobla materio** estas senmova, la Diistoj diras, ke se ĝin oni vidas moviĝanta - kio estas neneigebla - tio estas, ĉar la energio ekster la materio, ĉe la origino, penetris en ĝin, lokiĝis kaj impulsis la forton, kiu mankis al ĝi.

Nu, ĉu trovebla en la naturo estas iu fenomeno, kiu alportos ian valoron al tiu opinio?

Absolute neniu. Kaj ĉiuj observoj, kiujn oni faras, celas la certigon, ke la movado estas unu el la proprecoj ligitaj kun la materio kaj la materio mem. Oni povas esplori la spacon, sondi la profundaĵojn de l' Oceano aŭ fosi la internaĵon de la tero, oni ne nur trovas ĉie la materion, sed ĝin oni trovas konstante moviĝanta.

Tiu karaktero de universaleco de la forto en la spaco ebligas certigi la daŭrecon de tiu forto en la tempo.

Tiun daŭrecon miloj kaj miloj da konstatoj pruvas. La teorio de l' evolucio akceptigas la senĉesan transformismon de la materio; ĝi apogas sin sur la neinterrompitaj metamorfozoj, kiujn la estaĵoj kaj la objektoj spertas; ĝi utilas por klarigi la eternan **devenon**. Tiu senhalta modifo, tiu sinsekvo de statoj, tiel malrapida, kiel certa, ĉu ĝi ne estas la nekontraŭdirebla pruvo pri la daŭreco de la movado, la

atesto nerebatebla pri la ĉeestanteco de la movado en la tempoj plej antikvaj, kiel la certeco pri la ĉeestanteco mem dum la epokoj plej malproksimaj?

Kiu ne konas la principon, kiun en meĥaniko oni nomas "persisto de la forto"? Kiu ne scias, ke la forto, la movado, neniam malaperas, eĉ neniam malpliiĝas; ke estas nur **ŝanĝiĝo**, t.e. ŝanĝo en la Naturo kaj en la efikoj de la movado, sed nur se tie ĉi ĝi estas varmo, tie lumo, aliloke elektro, la tuta movado translokiĝas spite diversajn aspektojn, sub kiuj ĝi montriĝas, sed ankoraŭfoje neniam spertante plej etan malpliiĝon.

Tio estas alfaro al movado de tiu veraĵo en ĥemio: "nenio kreiĝas, nenio perdiĝas".

Sekve, oni povas certigi, ke la movado estas la propreco de la materio, ke oni ne povas elpensi tiun ĉi, ne elpensante la duan, kaj se neeblas difini al la materio komenciĝon, ankaŭ pli neeblas difini devenon al la movado, ĉar oni ne povas pli observi la materion senmova ol la movadon senmateria; ke tiel, se oni konsideras, ke la materio estus ricevinta movadon dank'al la komenca antaŭenpuŝo, la hipotezo "Dio" havas nenian utilecon.

## La ordo en la Universo

Pri tio, kion nia intelekto nomas "ordo kaj harmonio en la Universo", ni rimarku, ke ni kvalifikas "ordigita" tion, kio estas en akordo kun la observoj ĝis nun de ni faritaj. La regula sinsekvado de la tagoj, de la noktoj, de la sezonoj, la antaŭvidita ripetiĝo de samaj fenomenoj, la konstato pri similaj efikoj sekvantaj similajn kaŭzojn, unuvorte, la observo ĉiam identa en si mem per la ĝusta kaj metoda enĉenigo de samaj faktoj: jen tio, kion ni nomas **Ordo**.

Ĉiu ŝanĝo, ĉiu malobeo kontraŭ tiuspecaj reguloj elirintaj el la multiĝo kaj konstanteco de niaj personaj konstatoj kaj el la ĝeneralaj observadoj formas la **Malordon**.

Unuvorte, **ordo** kaj **malordo** estas du terminoj, kies signifo estas ekskluzive **subjektiva**, tial ĉio, kio estas kon-

forma al la konoj, kiujn ni ellernis aŭ kiujn oni al ni instruadis parkere, estas rigardataj kiel **ordo**; estas rigardata kiel **malordo** ĉio, kio estas kontraŭa al tio.

Sekve, la harmonio, kiun ni rimarkas en la kosmo procedas de nia spirito. Kaj tiuj admirindaj ordaj ecoj, kiuj nin kontempligas antaŭ la reguleco de la universa aranĝo, estas nia intelekto, kiu grandanime tion atribuis al la Naturo.

La Ordo, Malordo, estas objektoj, kiuj, esence, ne ekzistas. En la sunaj mondoj, kiuj plenigas la spacon, estas nek ordo, nek malordo; estas nur korpoj, kiuj pro sia volumeno, denseco, respektivaj proprecoj, sin movadas laŭ kondiĉoj ĝis nun de ni observitaj, kaj ĉiam la samaj.

Tiel, ne estas ordo en la Naturo, escepte nur tiu, kiun nia intelekto metis en ĝin. La kreinto de la Ordo, de la Harmonio, do tio ne estus Dio, sed tio estus la homo!

# La hipotezo "Dio" estas absurda

**R**ajte pravaj, pro tio ke la scienco ne ĉion klarigis, kaj imagante, ke ekster la konjekto pri kreo, originoj pri la mondo restas obstine nepenetreblaj, la kredantoj, por klarigi tiujn originojn, sin turnas al la hipotezo pri eterna Estaĵo, kies tutpotenco estus ĉion kreinta.

Necesus, unue, interkonsenti pri la valoro de tiu religia esprimo: krei.

Krei, tio ne estas preni unu aŭ kelkajn elementojn jam ekzistantajn kaj ilin kunaranĝi, tio ne estas kunigi materialojn kaj ilin aranĝi laŭ ia maniero. La horloĝisto, ekzemple, ne kreas poŝhorloĝon; la arkitekto ne kreas domon. Krei estas doni ekziston al tio, kio ne ekzistas, tio estas tiri ion el nenio, fari ion el nenio.

Nu! La hipotezo pri ia kreo estas reala absurdaĵo. Ĉar ne estas supozeble, ke el nenio oni povu ion fari: kaj la fama sentenco formulita de Lukreco* "**ex nihilo nihil**" (nenio povas eliri el nenio) estas kaj restas la esprimo de nekontraŭ-

---

* Latina poeto, aŭtoro de poemo pri Naturo (95-51. a.K.)

direbla ĝusteco.

Se do la materio ne povis esti eltirita el nenio, tio estas ĉar ĝi ĉiam ekzistis, kaj tiuokaze, oni devas sin demandi, ĉu en la hipotezo pri Estaĵo-Kreinto, kie troviĝis tiu materio.

**Ĝi povis esti nur en ĝi aŭ ekster ĝi.**

En la unua okazo, Dio ĉesas esti pura spirito: la materio estis en ĝi, ĝi loĝis en ĝia estaĵo, ĝi estis parto konsistiga de ĝia individueco; same kiel ĝi, ĝi estas eterna, senfina, tutpotenca, ĉar Absoluteco ne ebligas kaj ne povas ebligi ian okazecon, ian relativecon. Sekve, la materio estas sia **memkreinto**, kaj la hipotezo pri senmateriaĵo tirinta el si mem materiajn elementojn fariĝas malsprita.

En la dua okazo, t.e. se la materio ne estis en Dio, sed ekster ĝi, ĝi estis kunekzistanta kun ĝi; ĝi ne plu havas originon ol ĝi; same kiel ĝi, ĝi estas daŭre eterna; tiam ĝi ne estis kreita, kaj la konjekto pri kreo fariĝas absurda.

En ambaŭ okazoj, tio estas sensencaĵo, senprudento!

Sed kie la absurdeco de la kristana kreo montriĝas eble pli evidenta, tio estas tiel ke ĝi sin prezentas al ni sub formo malpli abstrakta en la Revelacio.

## La Revelacio

La ideo pri kreo fatale elvokas tiun pri Leĝdonado superega, kaj la ideo pri Leĝdonado superega implicas devige sankciigon.

Tio estas tiel ĝusta, ke ne estas unu sola religio, kiu ne enhavas samtempe ordonojn kaj malpermesojn formantajn la "Leĝon de Dio", kaj sistemon de rekompencoj kaj punoj difinotaj por sankciigi tiun Leĝon.

Oni devas aldoni, ke por fariĝi superega Juĝisto, estas necese, ke la Majstro konigu al ni sian Leĝon, por ke ni eksciu kion ni devas fari por meriti la rekompencon; kion ni devas eviti, por eskapi la punon.

La Revelacio estas ago per kiu la Kreinto, principo de ĉiu Justeco kaj de ĉiu Vereco, estus koniginta al ni sian Leĝon. Ĝi estus utiliginta al si kiel perantojn, preferitajn Estaĵojn :

profetojn kaj apostolojn, kiujn la kristana religio prezentas al ni kiel inspiritajn de Dio.

Tio estas do per la buŝo de tiuj inspiritaj personoj, ke la **Dia parolo** estus aŭdiginta sin, kaj tiam en la Skribaĵoj nomitaj "sanktaj" estus registrita la Revelacio.

Nu! Kion instruas al ni la Skribaĵoj pri la origino de l' mondo, ĝenerale, kaj pri la homo, aparte? Ili instruas nin pri aferoj, kiujn la nescio de niaj prapatroj povis akcepti kiel veraĵojn, sed kiujn jam ne estas permesite kredi hodiaŭ, tiel ili estas en malakordo kun la certigoj de la nuntempa scienco.

Ili instruas nin, ke elirante subite el sia jarcenta senokupo, la nomita Dio havis la fantazion naski tion, kio ekzistas, kaj kreis la tuton en la daŭro de ses tagoj.

Je kiu momento la Eternulo kreis tiun ellaboraĵon? Kiam ĝi humiliĝis, kiel **Malebranche*** diris, konsentis fariĝi kreinto? - Je ia momento de l' tempo. Jen estas tio, kion certigas ĉiuj Genezoj**, tio, kion cetere implicas la vorto kaj la ideo pri kreo. Tiam ĉu Dio estus kunmetinta kruce siajn brakojn dum la antaŭa eterneco?

Sed kio estas eterneco dividita en du partojn? Kiel akcepti la ideon pri ĉefa geometriisto dormanta tutan unuan eternecon, poste vekiĝanta subite por tiri el nenio tiun universon ĝis nun malestantan, por plenigi kaj objekthavigi la nemezureblan malplenaĵon, por doni al tiu universala morto la universalan vivon?

La kontraŭdiro estas evidentega. La necesa Estaĵo ne povis dum unu sola momento resti senefika. La agema kaj eterna Estaĵo ne povis eterne preterlasi agadon. Oni do devas akcepti mondon eternan simile al la Kreinto. Sed akceptante tiun kunekzistadon, oni konfesas, ke la Universo ne estas kreita, ke la kreo estas absurdaĵo, neeblaĵo.

La Skribaĵoj datas la superakvegon je 700 jaroj post la

-------

* Malebranche, franca filozofo (1638-1715), aŭtoro de libro: "**La Serĉado de la Vero**".

** Genezo: Produkto de la organizitaj estaĵoj. Unua parto de la Biblio.

Kreado, kaj 3700 jarojn antaŭ la naskiĝo de Jesuo-Kristo, de kiu 1900 nin apartigas. Adiciante tiujn tri nombrojn, oni vidas, ke la Kreado datiĝus de 6300 jaroj. Tiel estas la naskdato, kiun plaĉis al la Ĉiopovanto aljuĝi al sia ellaboraĵo, kaj kiun li komunikis per la Revelacio.

Nu! Estas certigite per kalkuloj severege precizaj, ke la geologiaj malstariĝoj, kiuj revoluciis nian planedon, okazis antaŭ miloj kaj centoj da miloj da jarcentoj. Kiu ne scias, ekzemple, ke, ĉar niaj plej altaj nuntempaj arbaregoj produktas aliformigita en terkarbon nur maldikan dekkvinmilimetran tavolon, oni kalkulis, ke por formi la profundajn tavolojn similajn al tiuj de Northumberland* necesus almenaŭ naŭ milionoj da jaroj? Kaj tamen la **ter-karba formado** ne estas io alia ol unu el la kvin aŭ ses grandaj periodoj, kiuj antaŭiris la historian epokon, la epokon de la homo sur la tero.

Pri tiu lasta epoko, la pruvoj sufiĉegas por montri, ke ĝi datiĝas de multaj miloj da jarcentoj. Oni ĉe kelkaj lokoj kolektis homajn ostojn enfositajn en grandegaj profundaĵoj apud silikoj, terpotaĵoj, kaj aliaj objektoj miksitaj kun restaĵoj de grandegaj pakidermoj. Fariĝas evidente, per kalkulo proporcia, ke la homo, samtempano de la elefantoj kaj rinoceroj, jam ekzistis antaŭ ĉirkaŭ tricent mil jaroj.

Ĉu mi parolu pri tiu ridinda legendo rilate Adamon kaj Evan en la tera paradizo, ĝuantajn perfektan feliĉon, kaj defalintajn subite, ĉar ili malobeis la ordonon pri netuŝo al frukto malpermesita? Ĉu mi parolu pri Jonaso loĝinta tri tagojn en la ventro de baleno, kiam estas pruvite, ke la ezofago de tia besto ne ebligas trairon de homa korpo? Ĉu mi parolu pri la trairado de la Ruĝa Maro senakvigita? Ĉu mi parolu...?

Ne! Tio estas tro ridinda. La absurdeco estas evidentega. Kia efiko por Dio, por la principo kaj fonto de ĉiu vero, de ĉiu scienco, tia elmontrado de malspritaĵoj, tia amaso da mensogoj kaj da eraroj! Ni ne insistu.

-------

* Angla graflando; ĉefurbo: Newcastle.

# La hipotezo "Dio" estas krimeca

La konsideroj, kiuj restas al mi detale klarigi, rilatas al **Dio-Providenco.**

Oni nomas Providenco la regadon de la mondo fare de Dio, kiu ĝin kreis.

Videble estas, ke tia regado farata de Estaĵo, kiu ĉion antaŭvidas, kiu ĉion scias, kiu ĉion kapablas, devus nenian malordon, nenian ribelon toleri.

Nu, la malbono ekzistas: malbono fizika kaj malbono morala, kaj la estado de la malbono estas radikale malkunigebla disde tiu de Providenco.

## La Providenco kaj la Malbono

Ni suferas de la atmosferaj malordoj, de la vulkanaj erupcioj, de la tertremoj, de la ventegoj, de la ciklonoj, de la bruladoj, de la superakvegoj, de la senpluveco, de la malsato, de la malsanoj, de la malfeliĉegoj, de la vundoj, de la doloroj, de la morto, k.c, k.c., tio estas la fizika malbono.

Ni estas ĉeestantoj kaj viktimoj de nekalkuleblaj maljustaĵoj, perfortoj, tiranaĵoj, senigoj, mortigoj, militoj. Ĉie la friponeco triumfas kontraŭ la sincereco, la eraro kontraŭ la vero, la avido kontraŭ la malprofitemo. Pri la sciencoj, artoj, kion faras el ili la regantoj, specoj de surteraj providencoj? Ĉu ili uzas ilin por la paco, la bonstato, la ĝenerala feliĉeco? La historio, plena je kruelegaj krimoj kaj teruraj malfeliĉegoj, estas nur la rakonto pri la malbonoj de la homaro: tio estas la malbono morala.

El kie eliras la malbono? El kie ĝi venas?

Se oni akceptas la ekziston de Dio, oni samtempe akceptas, ke ĉio, kio ekzistas, procedas de Ĝi. Estas do Dio, tiu verema Dio, kiu naskis la eraron, Dio, tiu principo de Justeco, kiu naskis Maljustecon, Dio, tiu fonto de ĉiu Boneco, kiu naskis Krimon.

Ĉu ĝuste tiun Dion, centron kaj ejon de la doloro kaj malvirto, mi devus respekti, servi, adori?

La malbono ekzistas, neniu povas ĝin nei.

Nu! El du aferoj ni elektu unu: aŭ Dio povas forigi la malbonon, se tion ĝi ne volas; en tiu okazo ĝia potenco restas tuta, sed se ĝi restas multpova, ĝi iĝas malbona, kruelega, krimema; aŭ Dio volas forigi la malbonon, sed tion ĝi ne povas; kaj tiam ĝi ĉesas esti kruelega, krimema, sed ĝi fariĝas senpotenca.

Tiu rezonado ĉiam estis kaj ĉiam estos senresponda.

Ĉu la komprenado kaj la sentado, kiujn ni havas pri la Justeco, ne diras al ni, ke se iu ajn vidas fari antaŭ siaj okuloj malbonan agon, kaj povante ĝin malebligi, lasas ĝin plenumi, fariĝas kunkulpa pri tia faro kaj krimulo, kiel la plenuminto?

Tiu Dio, kiu pro sia ĉiopoveco povus malebligi senpene la malbonon kaj ĝiajn abomenojn, kaj kiu ne sin intermetas, tiu Dio estas krimulo, ĝi havas senliman kruelegon. Kion mi diras? Ĝi sola estas kruelulo, ĝi sola estas krimulo. Ĉar ĝi sola estas kapabla voli kaj povi, ĝi sola estas kulpa kaj respondeca pri ĉio.

## Dio kaj la homa libereco

Estas vere, ke per tia fleksebleco, kiu karakterizas la religiecon, kaj per la helpo de tiuj insidaj sofismoj, kiuj kun la pastra raso faris la kazuistikistojn plej danĝeraj, la Diistoj kontraŭdiras, ke la malbono ne estas faro de ilia Dio, sed tiu de la homo, al kiu Dio pro sia regnestra boneco estus privilegie doninta propraĵon tian: la liberecon, por ke ĝi kapablu distingi la bonon disde la malbono, kaj sin montri favora al la unua prefere al la dua, kaj estu juĝota pri siaj agoj, kaj ekkonu la rekompencon aŭ punon ligitan al la praktikado de la bono aŭ malbono.

Tiu ĉi kontraŭdiro estas senvalora.

Kaj unue, se ni supozas unu momenton, ke Dio ekzistas, kaj ke ĝi konsentis doni al ni la liberon, oni ne povus malkonfesi, ĉar tiu libero venas el ĝi, ke ĝuste ĝi per agado sin trudas tiel en la malbono kiel en la bono. Ĉu oni povas

klarigi, ke kun tiu peceto da libero forprenita el tiu Estaĵo regnestre libera, oni faru tiel malbonan uzon, sen ke la Dia libero estus enhavinta laŭ potenciala stato - same kiel la semo enhavas la rikolton - tiun rikolton da hontindaĵoj, da malnoblaĵoj, da suferoj?

Se la mensogo, la nescio, la malbono, la krimo elvenas el tiu libero, kiun Dio donacis al ni, Dio mem estas mensogulo, nesciulo, malbonulo, krimulo.

Sed akordigi tiujn du aferojn: ekziston de Dio kaj homan liberon, estas io neebla. Se Dio ekzistas, ĝi sola estas libera.

La estaĵo, kiu parte dependas de alia, nur parte estas libera; tiu, kiu estas sub la tuta regeco de alia ĝuas nenian liberon; ĝi estas la propraĵo, la objekto, la sklavo de tiu ĉi lasta.

Tiam, se Dio ekzistas, la homo estas nur la ludilo de ĝia kaprico, de ĝia fantazio. Tiu, al kiu nenio estas kaŝebla pri niaj intencoj aŭ agoj; tiu, kiu havas rezerve pretajn, senfinajn turmentegojn, punontajn la bravegulon, kiu malobeus ĝiajn ordonojn aŭ malpermesojn; tiu, kiu pli rapida ol la fulmo povas nin mortigi ĉiuhore, ĉiusekunde; tiu ĉi sola estas libera, ĉar ĝi sola proponas kaj disponas. Ĝi estas la mastro; la homo estas ĝia sklavo.

Ĉiaokaze, kion opinii pri la sovaĝeco de tiu Juĝisto, kiu, antaŭvidante niajn agojn fatale okazontajn, konforme la Dian antaŭkonon, nin superŝutas per torentoj da fajro kaj nin ĵetas en la eternan restadejon de neesprimeblaj turmentoj, por puni unuhoran eraron, unuminutan forgeson?

El ĉiuj turmentegistoj, tiu Juĝisto estas la plej nepardonebla, la plej maljusta, la plej turmentema!

## La krimoj de la religioj

Tiam ĉu vi ankoraŭ miros pri la malbono, kiun la religioj faris al la homaro, pri la turmentoj per kiuj ili plenigis la teron?

Krima laŭ la vidpunkto metafizika, la ideo pri Dio estas - se eble - ankoraŭ pli krima laŭ la vidpunkto historia.

Ĉar Dio estas la religio.

Nu, la religio estas la **penso enkatenigita**. La kredanto havas okulojn, sed ĝi ne devas vidi; ĝi havas orelojn, sed ĝi ne devas aŭdi; ĝi havas manojn, sed ĝi ne devas palpi; ĝi havas cerbon, sed ĝi ne devas rezoni. Ĝi ne devas fidi siajn manojn, siajn orelojn, sian intelekton. Pri ĉiuj aferoj, ĝi havas kiel devon demandi la revelacion, kliniĝi antaŭ la tekstoj, konformigi sian penson laŭ la instruoj de la ortodokso. La evidentecon ĝi nomas blasfema senhonteco, kiam ĝi montriĝas kontraŭa al ĝia kredo. Falson kaj mensogon ĝi proklamas vero kaj realo, kiam ili utilas por la profitoj de ĝia Dio.

Ne penu montri al ĝi, laŭ videbla maniero, la netaŭgecon de ĝiaj superstiĉoj; ĝi respondos, al vi fermante la buŝon, se tion ĝi povos, vin insultante malkuraĝe malantaŭe, se ĝi estas senpova.

La religio forprenas de la infano la inteligentecon apenaŭ naskiĝintan kaj ĝin formas per neraciaj procedoj, alkutimigas al eraraj metodoj, kaj ĝin lasas sendefenda kontraŭ la racio, ribela kontraŭ la ĝusteco. La atencon, kiun la Dogmo provas plenumi kontraŭ la hodiaŭa infano, ĝi plenumis dum jarcentoj kontraŭ la infaneca homaro. Profitante, trouzante la kredemon, la nescion, la timeman spiriton de niaj prapatroj, la religioj - ĉiuj religioj - mallumigis la penson, enkatenigis la cerbon de la estintaj generacioj.

La religio estas ankaŭ la **progreso prokrastita**.

Por tiu, kiun la stultega atendo pri eterneco de ĝojoj aŭ suferoj malspritigis, la vivo nenion valoras.

Kiel daŭro, ĝi estas rapidpasa: dudek, kvindek, cent jaroj estas nenio kompare senfinajn jarcentojn, kiujn la eterneco enhavas. Ĉu la individuo, klinita sub la jugo de la religioj, atentos pri la graveco de tiu mallonga transiro, pri tiu unumomenta vojaĝo? Tion ĝi ne devas.

Laŭ ĝi, la vivo estas nur la antaŭaĵo de la eterneco, kiun ĝi atendas; la tero estas nur la vestiblo, kiu al ĝi kondukas.

Do, kial batali, serĉi, kompreni, ekscii? Kial tiel sin okupadi por plibonigi la kondiĉojn de tia mallonga vojaĝo? Kial saga-

ce klopodi por igi por igi pli vasta, pli aerumita, pli heligita tiun vestiblon, tiun koridoron, en kiu oni haltas nur unu minuton?

Unu sola afero estas grava: savi sian animon, submetiĝi antaŭ Dio.

Nu, la progreso estas atingebla nur per obstina penado, kaj efektivigebla nur de tiu, kiu sentas ĝian bezonon. Ĉar bone vidadi, kontentigi siajn dezirojn, malpliigi sian penadon, pligrandigi sian bonstaton, estas aferoj malmulte valoraj por la kredemulo, kiun ne interesas la progreso!

Ke la religioj havas kiel konsekvencojn la enkatenigon de la penso kaj malsukcesigon de la progreso, tio estas veraĵoj, kiujn la historio celas konigi, faktoj tie konfirmontaj amase la sciigojn de la rezonado.

Ĉu eblas elpensi pli terurajn krimojn?...

Kaj la sangoverŝaj militoj, kiuj je la nomo kaj por satiĝo de la kultoj bataligis centojn, milojn da generacioj, milionojn kaj centojn da milionoj da batalantoj! Kiu kalkulos la konfliktojn, kies kaŭzo estis la religioj?

Kiu precizigos la nombron de la murdoj, de la buĉadoj, de la pafmortigoj, krimoj, per kiuj religia sektismo kaj netolerema mistikismo sangokovris la teron surpaŝitan de homaro premegita de sangavida tirano, kiun pastrecaj kastoj prenis sur sin la pereigan mision adorigi?

Kiu nekomparebla artisto iam scios pentri per la necesaj multkolora riĉeco kaj detala ĝusteco la tragediajn fazojn de tiu dramo, kiu dum ses jarcentoj terurigis la civilizaciojn sufiĉe malklerajn por ĝemadi sub la superrego de la katolika Eklezio, dramo, kiun la historio senhonorigis per la terura vorto "Inkvizicio"?

La religio estas la malamo ĵetita inter la homojn, la malkuraĝa kaj sklaveca rezignacio de milionoj da submetitoj, la aroganta kruelego de la papoj, de la pontifikoj, de la monaĥestroj, de la pastroj.

Ĝi estas ankaŭ la triumfo de kunpremiga moralo, kiu celas vundi la estaĵon: moralo pri fasto de la karno kaj de la spirito, moralo pri humiliĝo, pri abnegacio, pri ofero; mora-

lo, kiu devigas la individuon haltigi siajn plej malavarajn ekdezirojn,, kunpremi siajn instinktajn impulsojn, obeigi siajn pasiojn, sufoki siajn aspirojn; moralo, kiu plenigas la spiriton je antaŭjuĝoj malspritaj kaj turmentas la konsciencon per rimorsoj kaj timoj; moralo, kiu naskas rezignacion, rompas la vivpovan energiemon, sufokas la liberigan penadon de la ribelemo kaj konstantigas la despotismon de la mastroj, la ekspluatadon de la riĉuloj kaj la suspektindan potencon de la pastroj.

La nescio en la cerboj, la malamo en la koroj, la malkuraĝo en la volo, jen estas la krimoj, kiujn mi imputas al la ideo pri Dio kaj al ĝia fatala devenpropono: la religio.

Ĉiuj tiuj krimoj, pri kiuj mi publike, ĉe lumo de libera diskutado, kulpigas la trompantojn, kiuj parolas kaj agas je la nomo de iu Dio, kiu ne ekzistas, jen estas tio, kion mi nomas "la Krimoj de Dio", tial ke en ĝia nomo ili estis kaj ankoraŭ estas farataj, ĉar ili estis kaj ankoraŭ estas naskitaj de la ideo pri Dio.

.............................

Jam de tro longe la homaro inspiras sin pri Dio sen filozofio; estas la momento, ke ĝi petu sian vojon al filozofio sen Dio.

**Sébastien FAURE**

Johann MOST

# La Dia Pesto



# Johano MOST

***Johano MOST**, elpuŝita el Berlino, rifuĝis en Londono, kie li publikigis **Freiheit** (Libero) en 1879. La socialdemokrata partio eksigis lin en 1880 (kongreso de Wyden), sed, fariĝinte anarkiisto, li daŭrigis sian drastan propagandon. Li eĉ kunvokis alian kongreson en Ĝenevo (oktobro 1880), per kiu li aprobigis la "perfaran propagandon" (perfortan). **Freiheit**, kiu gloris la irlandajn murdojn, estis malpermesita de la angla registaro.*

***Most** foriris al Usono, tie daŭrigante sian revolucian propagandon. Lia broŝuro **La religia pesto** estis tradukita en preskaŭ ĉiujn lingvojn. Post la morto de la Martiroj de Ĉikago (1886), li skribis, ke endas ekzemplodone revenĝi*.*

*En sia "**Memorlibro**", Aŭgusto BEBEL amare bedaŭras, ke homo valora, kia estis MOST, kies sindediĉemon kaj batalemon devojigis la bismarka teroro, estis perdita de la socialdemokrata partio, kaj fine mizere pereis alkoholulo.***

----------

* Tiuj informoj estas ĉerpitaj el la libro de Andreo LORULOT, fama franca liberpensulo, "**Popola Historio de l' Tutmonda Socialismo**" (1945).

** El "**Socialista Enciklopedio**" (franca eldono, 8 volumoj, 1913).

La nuna traduko origine aperis en Usono, 1932, dank'al D-ro Tobias SIGEL, kiu dissendis ĝin senpage.

SAT-Broŝurservo, 1999.

# ANTAŬVORTO
## de D-ro Tobias Sigel

*La ateista literaturo en Esperanto pliriĉiĝis je malgranda, sed tre interesa verko, - "**La Dia Pesto**" de **Johann MOST.***

*Tuj en la komenco la leganto povas vidi, ke la libreto celas "kontraŭ Dion kaj Mesion". La faktoj estas donitaj klare kaj evidente, kaj mi volas nur diri vorton pri la Esperanta traduko.*

***Seman Tarano** uzas facile legeblan Zamenhofan lingvon. En la tuta libreto li eĉ konservis la humorajn kaj satirajn esprimojn de la verkinto. Krom tio, dum la legado de "**La Dia Pesto**" oni tute forgesas, ke oni legas ion tradukitan, ĉar la stilo estas laŭ la karaktero de nia lingvo, kaj la libreto estas legata kvazaŭ Esperanta originalo.*

*Mi deziras al "**La Dia Pesto**" sukcesan vojaĝon.*

*D-RO TOBIAS SIGEL*

# LA DIA PESTO

El ĉiuj spiritmalsanoj, kiujn "la homo dum sia malluma vagado" sisteme inoluladis en sian kranion, la dia pesto estas la plej terura.

Ĉio havas sian historion, kaj ankaŭ tiu ĉi epidemio ne estas escepto. Oni povas nur bedaŭri, ke en tiu ĉi "historio" mankas la ordinara evoluo, la transirado de sensenco al prudento, kiel kutime estas en aliaj historioj. La antikva Zeŭso kaj lia samulo, Jupitero, estis tamen sufiĉe bonordaj, gajaj, ni povas diri, kvazaŭ kleraj estuloj, kompare kun la lasta naskotrio en la dia genealogio, kiu, sen ia dubo, povas kuraĝe konkursi kun Futzliputzli pri brutaleco kaj krueleco.

Cetere, ni ne povas procesadi kun la pensionitaj aŭ eksigitaj dioj, ĉar ili plu ne kaŭzas ian malutilon. Sed tial ni volas pli senrespekte kritiki, senvalorigi kaj forigi la ankoraŭ funkciantajn nubo-puŝantojn kaj infero-timigistojn de la ĉielo.

La kristanoj havas trioblan dion; iliaj antaŭuloj, la hebreoj, kontentiĝis je unu sola. Krom tio ambaŭ grupoj estas sufiĉe intima rondo. "La Malnova kaj Nova Testamentoj" estas por ili ambaŭ la fonto de la tuta saĝo. Tial oni vole-nevole devas legi tiujn "sanktajn skribojn", se oni volas lerni trarigardi ilin kaj priridi.

Se ni nur prenas la "historion" de tiuj diecoj, ni trovas sufiĉon por karakterizi la tuton. En mallonga resumo la afero estas jena:

"En la komenco dio kreis la ĉielon kaj la teron". Li sekve troviĝis antaŭe en la ĉiuflanka "nenio", kio ŝajnis tiel senkolora kaj senamuza, ke li, kiel dio, certe enuis. Kaj ĉar por dio estas bagatelo, elsorĉi mondojn el nenio, kiel ekzemple ĵonglisto elŝutas kokinajn ovojn aŭ arĝentajn talerojn el la manikoj, tial li *kreis la ĉielon kaj la teron*. Poste li bonorde eltornis *la sunon, la lunon kaj la stelojn*.

Certaj herezuloj, oni nomas ilin astronomoj, jam de longe konstatis, ke la tero nek estas centra punkto de la universo, nek ĝi iam povis esti, nek ĝi entute povis ekzisti antaŭ la suno, ĉirkaŭ kiu ĝi rondiras. Tiuj homoj pruvis, ke estas kruda idiotaĵo, paroli pri la "suno, luno kaj steloj" kaj pri la tero, kaj diri, ke la lasta estas io speciala kaj supera kompare kun la unuaj. Ili jam de longe entamburis al ĉiu lerneja knabo, ke ankaŭ la suno estas nur astro, la tero estas satelito de la suno, la luno estas, por tiel diri, subsatelito de la tero; ke la tero ne ludas la plej eminentan rolon, sed kontraŭe, ĝi apenaŭ estas kvazaŭ sunpolvereto, kompare kun la vastega universo.

Kial devas dio ĉagreniĝi pri astronomio? Li faras kion ajn li volas kaj fajfas pri scienco kaj logiko. Tio estas la kaŭzo, ke post la fabrikado de la tero li antaŭe faris la lumon kaj poste la sunon. Eĉ hotentoto nuntempe povas kompreni, ke sen la suno ne povas esti lumo sur la tero; sed dio, - hm! li ne estas ja hotentoto!

Sed ni aŭdu plue! La "kreaĵo" estis sufiĉe prosperinta, sed tamen ankoraŭ ne estis vera vivado en la mondeto. La kreinto ankaŭ volis sin amuzi. Tial li faris fine la homon. Nun li rimarkinde dekliniĝis de sia antaŭe uzita maniero de kreado. Anstataŭ fari tiun ĉi "kreaĵon" per simpla vorto *Estu!* li uzis tre multajn ceremoniojn dum la "kreado". Li prenis sufiĉe prozan argilbulon en la manon, elmodlis el ĝi virfiguron "laŭ sia propra bildo" kaj enblovis animon en ĝin.

Sed ĉar dio ĉiam estas bona, favora kaj justa, unuvorte - la ĝentileco mem - li do ekpensis, ke lia ellaboraĵo Adamo certe treege enuas, estante sola. (Eble li ekmemoris sian antaŭan enuigan estadon en la *nenio*.) Kaj tial li produktis sufiĉe belan kaj ĉarman Evon. Dume la sperto evidente instruis lin, ke ellaborado el argilaj buloj estas por dio tro malpura laboro, kaj li ekuzis novan metodon de fabrikado. Li eltiris ripon el Adamo kaj - lerteco ne estas sorĉado, precipe ĉe dio - aliformigis ĝin en beletan fraŭlinon. Ĉu Adamo poste reakiris alian ripon, aŭ li devis kuradi kiel "unuflankulo", - pri tio silentas la ĝentileco de la biblia historiisto.

La moderna naturscienco konstatis, ke animaloj kaj plantoj, el simplaj primitivaj molusko-substancoj, daŭre de milionoj da jaroj, disvolviĝadis pro multoblaj diverĝoj, ĝis ili ekhavis la nunajn formojn. Ĝi plue konstatis, ke la homo estas ne pli ol la plej perfekta produktaĵo de tiu evoluado, kaj ke li, antaŭ tiom kaj tiom da miljaroj, ne nur havis - en malvasta senco de l' vorto - bestan aspekton kaj ne havis paroleblecon, sed ke li ankaŭ - ĉiu alia supozo estas falsa per si mem - certe devenis de pli malaltaj bestklasoj.

La naturscienco sekve lasas dion aspekti kun sia memproklamita homfarado kiel naivega fanfaronulo. Sed kion ĝi utilas? Dio ne lasas iun ŝerci kun li. Ĉu liaj rakontoj sonas science aŭ sensence, li ordonis, ke la homo kredu je ili, alie li permesos okazi, ke lia konkuranto, la diablo, forprenu lin, kio certe estas tre malagrabla. En la infero ne nur regas konstanta kriegado kaj dentbatado, sed tie ankaŭ bruladas eterna fajro, vermo nelaciĝema mordetadas, kaj peĉo kaj sulfuro fiodoras netolereble. Al ĉio ĉi estas elmetata homo sen korpo. Stufiĝas lia karno, kiun li ne havas kun si; li grincigas la dentojn, kiuj jam de longe elfalis; li kriegas sen gorĝo kaj pulmo; liajn dispolviĝintajn ostojn mordetas la vermo; li flaras sen nazo, - kaj ĉio ĉi estas por eterne. Diabligita rakonto!

Dio estas entute, kiel li tre malkaŝe komunikis en sia memverkita kroniklibro, la biblio, eksterordinare kaprica kaj venĝema - vere, modela despoto.

Tuj kiam Adamo kaj Evo estis faritaj, li mem ekkomprenis, ke tiu gentaĉo devas esti regata; tial li donis punkodon, kiu dekretis severe: Ne manĝu de la arbo de l' scio! De tiu tempo ne ekzistis iam kronita aŭ nekronita tirano, kiu ne alĵetis al la popoloj tiun ĉi diktaton.

Adamo kaj Evo ne respektis tiun malpermeson. Tial ili estis elpelitaj kaj kondamnitaj, kun ĉiuj generacioj, por ĉiuj tempoj, al intensa laboro. De Evo, krom tio, estis deprenitaj la "burĝaj honorrajtoj", ĉar ŝi estis deklarita servantino de Adamo, kiun ŝi devas obei. Ili ambaŭ ankaŭ jam estis sub dia policobservo. Eĉ la plej kruela despoto ne agus tiel severe kun siaj regatoj.

Tamen la severeco de dio kontraŭ la homoj nenion utilis, ili pli ĉagrenis lin; ju pli ili multiĝis, des pli ili fariĝis malobeemaj. Kaj kiel rapide tiu plimultiĝo prosperis, oni povas rimarki jam ĉe la historio pri Kain kaj Habel. Kiam la lasta estis mortigita de sia frato, Kain iris "en fremdan landon" kaj prenis al si edzinon. De kie subite venis tiu "fremda lando" kun la tie troveblaj virinoj, tion ja la kara dio ne notis, kio estas ne mirinda pro lia tro laciga laborego.

Fine la mezuro estis plena. Dio decidis ekstermi la tutan homaron per akvo. Nur al kelke da homoj li favoris escepton, por ankoraŭ unu fojon provi la samon. Sed malfeliĉe li, malgraŭ sia tuta saĝo, denove enfalis en eraron, ĉar Noa, la ĉefo de la savitoj, tuj montris sin granda drinkulo, kun kiu liaj filoj moke ŝercis. Kio do bona povas elveni el tia malnobla familio?

Ree disvastiĝis la homaro; ree ĝi disvolviĝis en tiujn senrespektajn pekulojn, pri kiuj la konata Mecklenburg'a

Kantlibro povas sciigi tiom multe da malbonaj aferoj. Dio preskaŭ krevis de kolero, vidante, ke eĉ ankaŭ liaj lokaj punoj, la detruado de tutaj urboj per peĉo kaj sulfuro, helpis kiel kupoj al mortinta kato. Li jam decidis ekstermi la tutan popolaĉon, sed rimarkinda okazintaĵo ree mildigis lin:

En unu tago aperis iu certa "sankta spirito". Okazis same kiel nun la "Knabino el la Fremdlando" - neniu sciis, de kie tiu spirito alvenis. La verkinto de la biblio (dio mem) diras nur, ke li mem estis tiu sankta spirito. Nun ni dume havas aferon kun *dio-duunuo*. Tiu "sankta spirito" ekpensis konatiĝi, en formo de virkolombo, kun simpla fraŭlino, nomita Maria. Li "superombris" en dolĉa horo la *elektitinon* de sia koro, kaj jen! ŝi naskis knabeton; kaj tio tamen, kiel dio klare akcentas en la biblio, tute ne difektis ŝian virgecon. La antaŭe rimarkita dio nun nomis sin dio-patro, kaj tamen li certigis samtempe, ke li estas identa ne nur kun la "sankta spirito", sed ankaŭ kun la dia filo. Oni pripensu! La patro estas sia propra filo, la filo - sia propra patro, kaj krom tio ambaŭ kune estas ankaŭ "sankta spirito". Tiamaniere formiĝis la "*sankta triunuo*".

Kaj nun, kompatinda homcerbo, tenu vin firme, ĉar tio, kio nun sekvos, povas eĉ ĉevalon senvivigi! Ni scias, ke dio-patro decidis frakasi la tutan homamason. Tion dio-filo bedaŭris. Li (konata samtempe kiel dio-patro) prenis sur sin la tutan kulparon de la homoj, kaj por kvietigi la furiozecon de sia patro (konata samtempe ankaŭ kiel dio-filo), lasis sin ĝismorte senspirigi de tiu "savota" popolaĉo, - kompreneble ne tiel simple; li devis reveni por ree veturi gaje kaj ĝoje en la ĉielon. Tiu oferiĝo de la filo (kiu kun la patro estis nur unu), tiel dolĉe kontentigis la patron (kiu kune kun la filo estis nur unu), ke li tuj deklaris ĝeneralan amnestion, kiu estas parte valida ĝis nun.

Tio estas la "historia parto" de la "sankta skribo". Oni vidas, ke la absurdeco estas elmontrita tiel reliefe, ke tiu, kiu jam

estas sufiĉe blindigita kaj ankoraŭ kredas ĝin, devas esti konsiderata kiel homo kun frenezaj iluziaĵoj.

Al tiu parto apartenas antaŭ ĉio la dogmoj pri rekompenco kaj puno por la homo en la tiel nomata "alia flanko". De longe oni jam pruvadis science, ke ne ekzistas anima vivo sendepende de la korpo; ke tio, kion la religio-ĉarlatanoj nomas *animo*, estas ne pli ol la pensorgano (cerbo), kiu ricevas impresojn de la vivaj sentorganoj, kaj tial ĝi fariĝas funkcia, kaj sammomente kiam la korpo mortas, devas kunmorti ankaŭ tiu cerba moviĝo. Sed tiuj ĝismortaj malamikoj de la homa prudento ne ĉagreniĝas pri la rezultoj de scienca esplorado. Ili nur tiom interesiĝas pri scienco, kiom estas necese por kontraŭbatali ĝian influon.

Tial ili predikas la "eternan vivon" por la homa "animo". Ve al la animo en la "alia flanko", kies korpo, en kiun ĝi estis enŝovita en "tiu ĉi flanko", ne respektis precize la punleĝon de dio! Kiel tiuj homoj certigas, estas evidente, ke ilia "plej bona, plej justa, plej kompatema, plej favora, ktp, dio" estas tre pedanta flarnazulo, kiu ĉagreniĝas pri ĉiu malgravaĵo de ĉiu unuopulo, kaj enskribas en la "tutmondan dokumentaron" ĉiun erareton, kiun la homo faras. Krom tio li estas tre originala strangulo. Li deziras esti honorata per tio, ke ĵusnaskitaj infanoj, sub danĝero de malsaniĝo, estu superverŝataj per akvo, kaj oni nomas tion *baptado*. Li havas sovaĝan plezuron, kiam sennombraj kredemaj ŝafoj blekas al li litanie en siaj preĝo-staloj, aŭ kiam la plej fervoraj el la ŝafaro aŭdigadas senĉese pian katmuzikon kaj preĝas, petante pri ĉio ebla kaj neebla, - dum li partoprenas en sangaj militoj, kaj la venkintoj flatas lin per incenso kaj dankoj kaj nomas lin "dio de bataloj".

Li ekestas furioze kolera, se iu dubas pri lia ekzisto, aŭ se katoliko manĝas viandon en vendredo aŭ ne defrotas sufiĉe la pekojn en sia konfesado, aŭ se protestanto ne malestimas la ostojn de la sanktuloj, la madonajn ĉifonojn kaj bildojn,

donitajn al la katolikoj, aŭ, entute, se li ne somnambulas kun kapromiena vizaĝo, suprenturnitaj okuloj, kurbigita dorso kaj kunplektitaj manoj.

Kiam tia homo mortas ne pentinte, tiam lia "kompatema dio" diktas por li punon, kun kiu kompare ĉiuj batoj per skurĝoj kaj naŭvostaj vipoj, ĉiuj suferoj de malliberejoj kaj ekziloj, ĉiuj doloroj de la kondamnitoj al la eŝafodo, ĉiuj torturoj per ĉiuspecaj turmentiloj, kiujn homa tirano povus iam elpensi, estas nur tiklantaj agrablaĵoj. Tiu ĉi "dio" superas per bestia krueleco ĉion kanajlan, kion oni povus trovi sur la tero.

Lia malliberejo estas nomata *infero*, kiun ni jam konas, lia *ekzekutisto* estas la diablo, kaj liaj punoj daŭras eterne. Li, nur en okazo de malgravaj pekoj, post sufiĉe longa tempo, favoras amnestion, kondiĉe ke la pekinto mortis katoliko. Por tia favorata pekinto li preparis, sub certaj cirkonstancoj, "purgatorion", kiu diferencas de la infero proksimume kiel pundomo de malliberejo. Ĝi estas aranĝita nur por nedaŭra ensidigo kaj havas iom malpli severan disciplinon. Sed tamen, ankaŭ en la purgatorio vi sentegos la diablan fajron. La tiel nomataj "fundamentaj pekoj" neniam estas punataj per purgatorio, sed ĉiam per infero. Al tiuj pekoj apartenas, ekzemple, "blasfemado", ĉu per vorto, skribo, aŭ penso. Dio sekve ne toleras ne nur liberecon de preso kaj parolo, sed li ankaŭ jam trafas la neesprimitajn pensojn. Tio per si mem jam sufiĉas, ke li superu per brutaleco eĉ la plej friponajn despotojn de ĉiuj landoj kaj tempoj, sed li kompletigas tiun superecon per sia punmaniero. Tiu ĉi dio estas sekve la plej terura monstro imagebla.

Lia kondutado estas tiom pli aroganta, ke li altrudas la aserton, ke la tuta mondo, kaj precipe la homaro, kun ĉiuj agoj kaj movoj, estas reguligata de lia "providenco". Li do malbontraktas la homojn pro agoj, kies iniciatinto li mem estas! Kiel ĝentilaj estas la tiranoj de la tero, de la pasinta

kaj estanta tempoj, kompare kun tiu ĉi monstro!

Sed se al dio plaĉas lasi iun homon vivi kaj morti feliĉe, laŭ lia koncepto, tiam li malbontraktas tiun homon en ĝusta maniero, ĉar la promesita "ĉielo", precize konsiderata, estas multe pli malbona restejo ol la infero. Oni tie ne havas iajn bezonojn, sed oni estas ĉiam kontenta, ne havante antaŭe deziron por io kontentiga. Sed ĉar sen deziro kaj sen atingo ne povas esti ia ĝuo, do la restado en la ĉielo estas tute senĝua. Eterne oni observadas dion; eterne estas ludata la sama melodio de la sama harpo; ĉiam estas kantata "la nova kanto, la bela kanto", - eĉ se ĝi ne estas la enuiga kantaĵo pri "la ebria najlfaristo", ĝi tamen ankaŭ ne povas esti pli vigliga. Tio ĉi estas la plej alta grado de enuigeco. Restado en izolita karcero certe estus preferinda.

Ne mirinde, ke tiuj, kiuj estas sufiĉe riĉaj kaj potencaj por ĝui la paradizon sur nia tero, povas ride kanti kun Heine:

*"Apartenu la ĉieloj*
*Al paseroj kaj anĝeloj!"*

Kaj tamen la riĉaj kaj potencaj estas tiuj, kiuj nutras kaj flegas la dian idiotecon kaj religian stultecon. Tio estas nepre necesa por ilia profito.

Jes, por la regantaj kaj ekspluatantaj klasoj estas fakte demando pri vivo aŭ morto, ĉu la popolamaso estu tenata en religio aŭ ne. Kun la religia frenezeco sin tenas kaj falas ilia potenco.

Ju pli la homo algluiĝas al religio, des pli li kredas. Ju pli li kredas, des malpli li scias. Ju malpli li scias, des pli idiota li estas. Ju pli idiota li estas, des pli facile li povas esti regata.

Tio estis la pensmaniero de la tiranoj de ĉiuj landoj kaj tempoj, kaj tial ili ĉiam estis en bonaj rilatoj kun la pastroj. Okazaj malpacoj inter tiuj ambaŭ specoj de homaj malami-

koj havis nur hejman karakteron; ili estis nur konfliktoj pri supereco. Ĉiu pastro scias, ke lia rolo estus finita, se li ne havus plu la subtenon de la "grasa kremo". Por ĉiu riĉulo kaj potenculo ne estas sekreto, ke la homoj povas esti sklavigataj kaj ekspluatataj nur tiam, kiam la ekleziaj histrionoj enplantas en la korojn de la popolamaso sufiĉe da sklavemo, ke ili konsideru la teron kiel valon de larmoj, ke ili obeu la "dian" ordonon: "Servu viajn mastrojn!" kun promeso, ke post la morto ili havos apartan porcion da kolbaso, rostitan ie en nekonataj nestoj super la nuboj.

Ĉefjezuito Windthorst foje dum ardanta debato en la germana parlamento sufiĉe klare elmontris, kion la friponoj kaj kanajloj de la mondo pensas pri tiu ĉi afero.

"Se la popolo perdos la kredon" - li diris - "ĝi ne povos plu toleri la mizeregon, kaj ĝi ribelos!" Tio estis klare esprimita, kaj ĝi devus elvoki la seriozan konsideron de ĉiu laboristo, se tiom multe da ili ne estus tiel alnajlitaj al la religio, ke ili eĉ ne povas aŭdi per normalaj oreloj kaj koncepti la plej simplajn ideojn.

Ne vane la pastroj - t.e. la nigra ĝendarmaro de la despotismo - ĉiam fortege klopodadis malhelpi la malprosperon de la religia sentimento, kvankam ili mem, kiel oni scias, povus krevi de rido pri la sensencaĵo, kiun ili predikas por bona pago.

Daŭre de jarmiloj tiuj cerbdifektistoj simple kondukis terur-regimenton, sen kiu la religia frenezo jam de longe estus malaperinta. Pendigilo kaj glavo, karcero kaj katenoj, veneno kaj ponardo, insida kaj jura mortigoj, - tio estis la rimedoj por subteni la religian frenezon, kiu restos por ĉiam hontinda makulo en la historio de la homaro. Centoj da miloj estis malrapide rostataj sur la ŝtiparoj "en la nomo de dio", ĉar ili kuraĝis trovi fiodoron en la biblia sterko. Milionoj da homoj estis devigataj senkapigi unu la alian en

longe daŭraj militoj, ruinigi tutajn landojn kaj kaŭzi la pestojn post la mortigado kaj bruligado, - nur por konservi la religion. La plej originalaj torturoj estis elpensitaj de la pastraĉoj kaj iliaj helpantoj por, per diablaj ruzaĵoj, timigi kaj ree alpuŝi al la religio tiujn, kiuj ne volis plu timi dion.

Se homo kripligas ies manojn aŭ piedojn, oni nomas lin krimulo. Kiel oni nomu tiujn, kiuj kripligas la cerbojn de homoj kaj, ne povante tion sukcese atingi, pereigas la tutan korpon, ĝis la lasta colo, per ĉiu trovebla krueleco?

Certe estas vere, ke nuntempe ili ne povas plu praktikadi tiun kriman "dian" banditprofesion, kvankam procesoj de blasfemo ankoraŭ nun okazas; anstataŭ tio ili sin ĵetis al aliaj okupaĉoj, kiel enmiksi sin en privatajn familiajn aferojn, influi virinojn, ĉasi infanojn kaj malbonuzi la lernejojn. Ilia hipokriteco, pli ĝuste kreskis, ol pli malgrandiĝis. Eĉ la preson ili konkeris en tre alta grado, konvinkiĝinte ke tute forigi la presarton estas neeble.

"Kie pastro staris, dek jarojn herbo ne kreskos", diras malnova proverbo. Ĝi signifas per aliaj vortoj: Se iu falis foje en la ungegojn de la pastroj, lia intelekto ĉesas esti fekunda. La funkcio de lia cerb-mekanismo haltas, kaj religiaj akaroj kaj vermoj enrampas en la kranion kaj okupas la cerbon. Li similas ŝafon, kiu malsaniĝis je ŝanceliĝo.

Tiuj ĉi trompitaj malfeliĉuloj estas devojigitaj de la propra celo de la vivo; kaj, kio estas pli malbona, ili formas la grandan bandon de la malamikoj de scienco kaj klereco, de revolucio kaj libereco. Kiam ajn novaj katenoj por la homaro estas forĝotaj, ili estas pretaj, pelataj de sia malspriteco, labori ĉe la amboso. Kiam ajn traboj estas metotaj por bari la vojon al progreso, - la tuta amaso de tiuj ĉi hotentotoj vigle ĵetas sin kontraŭ la fluon de la tempo. Ĉiu peno por kuraci tiajn spiritmalsanojn estas bona faro ne nur rilate al la malsanulo mem, sed ĝi estas ankaŭ peno por kaŭterizi

kanceron, de kiu la tuta popolo suferas, kaj kiu nepre devas fine esti ekstermita, por ke la mondo fine estu komforta vivejo por la homoj, anstataŭ, kiel ĝis nun, ludejo por dioj kaj diabloj, kiuj liveras al ni nur turmentojn.

*

Ni eligu do la religion el niaj kapoj, kaj for la pastraron! La lastaj kutime diras, ke la celo sanktigas la rimedojn. Bonege! Ni uzu fine la saman maksimon ankaŭ kontraŭ ili! Nia celo estas liberigi la homaron de ĉia sklaveco, de la jugo de socia servpremo, de la katenoj de politika tiraneco, kaj ankaŭ - kaj eĉ antaŭ ĉio - de la religia mallumo. Ĉiu rimedo, kaj ĉiu okazo, por atingi tiun altan celon, devas esti konsiderata de ĉiuj homamikoj justa kaj ĝusta.

Ĉiu senreligia homo pekas kontraŭ sia devo, se li tage kaj nokte ne uzas ĉion eblan por ekstermi la religion. Ĉiu homo, kiu jam liberiĝis de la kredo je dio, kaj ne batalas kontraŭ la pastraro kiam kaj kie kaj kiel li nur trovas okazon, estas perfidanto de siaj ideoj. Do, militon kontraŭ la nigraj friponoj! Sencedan militon ĝis finbato! Ni incitu kontraŭ la trompantoj, ni klerigu la trompitojn! Ni uzu ĉiun rimedon de batalo: la skurĝon de moko, kiel la torĉon de scienco; kaj kie tiuj ne sufiĉas, - pli konkretajn kaj pli senteblajn argumentojn!

Antaŭ ĉio oni sin gardu mencii diajn frazojn kaj religian babilaĉon en la laborista movado. Same kiel en la atmosfero de la socia revolucio - kaj ĉio ekster ĝi estas reakcia - ne povas esti monarkia agitado aŭ aprobaj paroloj por privata propraĵo, tiel same ne estas tie loko por dia frenezaĵo. Kaj, rimarkinde, tiuj, kiuj volas kunmiksi la malbenindan religion kun la celoj de la laboristoj, ju pli "konvenaj" kaj "bonaj" tiuj ŝajnas, des pli danĝeraj ili estas. Ĉiu, kiu predikas la dian trompon en ia ajn formo, povas esti nur aŭ idioto aŭ fripono. Ambaŭ specoj tute ne taŭgas por la akcelo de afero, kies celo estas atingebla nur tiam, kiam ĝi staras

firme kaj plene sur la supro de scienca ekkono kaj posedas honestajn defendantojn.

Oportunista politiko estas ne nur abomenaĵo, sed ĝi estas krimo. Se la laboristoj lasos iujn pastrojn enmiksi sin en iliajn aferojn, ili estos ne nur trompitaj, sed ankaŭ tuj perfiditaj kaj venditaj.

Same kiel estas memkompreneble, ke la ĉefa batalo de la proletaro devas esti direktata kontraŭ la kapitalismon kaj, kune kun ĝi, por la detruado de ĝia potenca mekanismo, la ŝtato, tiel ankaŭ la eklezio ne devas esti lasita sen atento. La religio en la homaro devas esti sisteme subfosata, kiam ĝi, la homaro, prudentiĝos, alie ĝi ne povos gajni la liberecon.

Al la malsaĝuloj, aŭ pli bone malsaĝigitoj, se en ili ankoraŭ restis iomete da prudento, oni metu jenajn demandojn:

"Se dio volas, ke oni lin konu, amu kaj timu, kial li ne montras sin? - Se li estas tiel bona, kiel la pastroj certigas, kian kaŭzon oni havas por timi lin? - Se li estas ĉioscia, kial oni tedas lin per privataj aferoj kaj preĝoj? - Se li estas ĉieesta, pro kio oni devas konstrui templojn por li? - Se li estas justa, kial oni supozas, ke li punos la homojn, kiujn li mem kreis plenaj de malbonaj inklinoj? - Se la homoj faras bonon nur per la favoro de dio, kian kaŭzon li havas por rekompenci ilin por tio? - Se li estas ĉiopova, kiel li povas lasi, ke oni blasfemu lin? - Se li estas nekonceptebla, kial do ni okupas nin pri li? - Se la kono de dio estas necesa, kial li ŝvebas en malklareco?" Tiaj demandoj estas por la kredema homo kvazaŭ enigmoj.

Sed ĉiu pensema homo devas konsenti, ke neniam estis donita ia pruvo pri la ekzisto de dio. Krom tio, ne estas la plej malgranda bezono por lia ekzisto. Se oni jam scias la proprecojn kaj regulojn de la naturo, dio en aŭ ekster ĝi

simple estas senutila, tute superflua, kaj sekve tute neakceptebla. Lia "morala" celo por ekzisto estas ankoraŭ pli senvalora.

Estas granda imperio, regata de potenculo, kies procedoj kreas diversajn opiniojn inter la regatoj. Li volas, ke oni lin konu, amu kaj honoru, sed li ĉiam penas konfuzi la imagojn, kiujn oni povus havi pri li. La popolo, submetita al lia potenco, havas nur tiajn ideojn pri la karaktero kaj leĝoj de sia nevidata imperiestro, kiajn liaj ministroj komunikas, kvankam tiuj konfesas, ke ili mem ne povas ekhavi imagon pri sia mastro, ke lia volo ne estas esplorebla, ke liaj vidpunktoj kaj proprecoj estas nesondeblaj. Kaj tamen liaj servantoj mem neniam konsentas inter si pri la ordonoj, kiujn ili donas al la popolo, kiel liveritajn de *li* mem, ĉar en ĉiu provinco de la imperio liaj ordonoj diferencas. Ili riproĉas sin reciproke kaj kulpigas unu la alian pri rompado kaj falsado. La ediktoj kaj ordonoj, kiujn ili pretendas havi la rajton prezenti al la popolo, estas nubaj; ili estas enigmoj por tiuj, al kiuj ili estas donitaj kvazaŭ por klerigado, kaj ili ne povas ilin kompreni nek diveni. La leĝoj de la kaŝita monarko bezonas klarigojn, sed tiuj, kiuj klarigas ilin, mem neniam estas konsentaj inter si. Ĉio, kion ili rakontas pri la nevidata imperiestro, estas kaoso de kontraŭdiroj. Ili eĉ ne diras vorton, kiu tuj ne povus esti pruvata kiel mensogo. Oni diras, ke li estas eksterordinare bona, tamen ne estas iu, kiu ne plendas pri lia agado. Oni diras, ke li estas eksterordinare saĝa, sed ĉio en lia administrado ŝajnas sensenca kaj senprudenta. Oni gloras lian justecon, sed la plej bonaj el liaj servantoj estas ordinare la malplej favorataj. Oni certigas, ke li vidas ĉion, tamen lia ĉieesteco forigas nek malĝojon nek ĉagrenon. Li estas, oni diras, amiko de bonordo, sed en lia regno ĉio estas konfuza kaj malorda. Li faras ĉion laŭ propra decido, sed la faritaĵoj malofte estas laŭ liaj planoj. Li ĉion antaŭvidas, sed li ne scias, kio baldaŭ okazos. Li ne lasas iun ofendi lin, sed li toleras ofendojn de ĉiu ajn. Oni admiras lian scion kaj la perfektecon de liaj ver-

koj estas neperfektaj kaj por mallonga daŭro, ĉar li kreas, detruas kaj plibonigas tion, kion li faris, ne estante kontenta pri ĝi. Ĉiuj liaj entreprenoj estas por lia propra gloro, tamen la celon, esti glorata de ĉiu, li ne atingas. Li laboras nur por la bonstato de siaj regatoj, sed tiuj plej ofte suferas pro manko de la plej necesaj bezonaĵoj. Tiuj, al kiuj li ŝajnas plej favora, estas ordinare plej malmulte kontentaj pri sia sorto; ni vidas preskaŭ ĉiujn ilin riproĉi iun mastron, kies saĝecon ili gloras, kies bonecon ili adoras, kies justecon ili timas, kaj kies ordonojn ili respektas, sed kiujn ili neniam obeas.

Tiu ĉi imperio estas la mondo; la imperiestro estas dio; liaj ministroj estas la pastroj; liaj subuloj estas la homaro, - bela aglomeraĵo!

La dio, precipe de la kristanoj, estas dio, kiel ni vidas, kiu faras promesojn, por ilin rompi; kiu sendas pestojn kaj malsanojn al la homoj, por ilin resanigi. Li estas dio, kiu kreis la homojn laŭ sia propra bildo, kaj ĉio malbona ne estas atribuata al li; kiu vidis, ke ĉiuj liaj verkoj estas bonaj, kaj tamen li tuj ekkomprenis, ke ili estas malbonaj; kiu sciis antaŭe, ke la homo manĝos la malpermesitan frukton, kaj tamen li poste kondamnis por tio la tutan homan posteularon.

Dio, kiu estas tiel malforta, ke li lasas sin superruzi de la diablo; tiel kruela, ke neniu tirano sur la tero povas esti komparata kun li, - tiu estas la dio de la hebrea-kristana teologio.

Tiu ĉi dio estas fuŝulo, kiu kreis la homojn perfektaj, sed li ne povis konservi ilin perfektaj; kiu mem kreis la satanon, kaj tamen ne povis superpotenci lin; ĉiopova, kiu kondamnis milionojn da senkulpaj pro la pekoj de kelkaj; kiu ekstermis la tutan homaron, kun escepto de kelkaj homoj, kaj estigis novan generacion, ne pli bonan ol la antaŭa; kiu kreis ĉielon

por la malsaĝuloj, kiuj havas kredon en la Evangelio, kaj inferon por la saĝuloj, kiuj malakceptas ĝin.

Li estas dio-ĉarlatano, kiu kreis sin mem per la "sankta spirito"; kiu sendis sin mem kiel peranton inter si kaj aliaj; kiu, malestimita kaj mokita de siaj malamikoj, estis alnajlita al kruco, kvazaŭ vesperto sur pordo de garbejo; kiu lasis sin enterigi, revivigis sin, vizitis la inferon, flugveturis vivanta en la ĉielon, kaj nun, dum pli ol mil naŭcent jaroj, li sidas ĉe sia propra mano, por juĝi la vivantojn kaj mortintojn, tiam, kiam vivantoj plu ne ekzistos.

Li estas terura tirano, kies historio devas esti skribita per sango, ĉar ĝi estas religio de teruro.

For, do, la kristanan teologion! Liberiĝu de dio, eltrovita de sang-ekleziaj pastroj, kiuj sen ia grava *nenio*, per kio ili ĉion klarigas, ne povus plu vivadi en diboĉo; predikadi malriĉecon, kaj mem havi brilan vivon; predikadi humilecon, kaj praktikadi fierecon, - sed kiuj, pelate de la evoluado, fine estos ĵetitaj en la profundon de forgeso.

For la kruelan triunuon - la murdeman patron, la nenaturan filon kaj la voluptaman sanktan spiriton! For la falsajn iluziojn, en kies nomo oni malaltigis la homojn ĝis mizeraj sklavoj, kaj per la potenco de mensogo oni trompadis ilin, ke ili havos ĝojon en la ĉielo, kiel kompenson por la malĝojo sur la tero. For la "sanktulojn", kiuj estas kun sia frenezaĵo malbeno al la libero kaj feliĉo!

Dio estas ne pli ol fantomo, eltrovita de ruzaj friponoj, por tenadi ĝis nun la homojn sub teruro kaj tiraneco. Sed la fantomo tuj neniiĝas, kiam ĝi estas observata tra vitro de seniluzia esploro; kaj la trompitaj popolamasoj indigne ĉesos estimi la timigilojn, sed kontraŭe, ili direktos al la pastraro la vortojn de la poeto:

*"Malben' al idoloj, al kiuj senfine*
*Por varmo kaj pano preĝadis ni kline.*
*Ni ĉiam atendis kun vana esper';*
*Trompataj ni estis en nia mizer'."*

Oni devas esperi, ke ili ne lasos sin plu trompi, moki kaj friponi, sed en iu bela tago ili ĵetos la krucifiksojn kaj la sanktajn bildojn en la fronon; ili faros el la hostivazoj kaj kalikoj utilan vazaron; ili uzos la templojn kiel koncertejojn, teatrojn kaj kunvenejojn,aŭ, se tiuj ne taŭgos por tio, ili uzos ilin kiel grenejojn aŭ ĉevalejojn; ili trovos por la pastroj kaj monaĥinoj utilan laboron, - kaj nur unu aferon ili ne komprenos: kial tio ne okazis de longe.

*

Tiu ĉi mallonga, preciza kaj sole praktika procedo certe perfektiĝos dum la furiozo de la venonta sociala revolucio, kiam la subtenantoj de la pastraro - la princoj, nobeloj, burokratoj kaj kapitalistoj - estos forbalaitaj kvazaŭ de uragano, kaj nia mondo puriĝos de la koto, kiu amasiĝis dum miloj da jaroj.

**Johann MOST.**

**Pri similaj temoj, en la sama serio:**

**Kial mi estas ateisto** (Andreo LORULOT)

**La mistero de nia surtera ekzisto**
(Ernest ARCHDEACON)

**Unueco super prokreda dividiĝo**
**Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo**
(Leo POLAK)

**La konflikto** (LE DANTEC)

**La racia kaj ateista budhismo**

**La Kvina Evangelio** (HAN RINER)

**La Laoco aŭ La Libro de moralo**

k.a.

senpaga katalogo ĉe:
Esperanto - FR-47470 Beauville

Por SAT-Broŝurservo presis:
Baudé - FR-47470 Beauville